

**Usona**

# **Esperantisto**

**Bulteno de Esperanto-USA - N° 2024:3**

**Festo ĉe la plaĝo**

*Fotinto: Ruth Ke vess-Cohen*

<b>Anoncoj</b>	<b>p.3</b>
<b>Redakciaj rimarkoj</b>	<b>p.8</b>
<b>Jul-Aug Board Activity</b>	<b>p.8</b>
<b>Financa raporto</b>	<b>p.9</b>
<b>de la kasisto</b> • Matt BROOKS	
La unua financa raporto de nia nova kasisto.	
<b>Rimarko el la ruĝtapiŝa evento</b>	<b>p.9</b>
<b>kino</b> • Brandon DYER	
Dankon kaj bondezirojn al la Usona Bona Film-Festivalo dum jaroj plu!	
<b>Heleno, Bonvola Filozofigisto?</b>	<b>p.10</b>
<b>informado</b> • Alena ADLER	
Ne ĉiam daŭras malbona vetero, ne ĉiam daŭras homa sufero.	
<b>Postkongresozaj notoj el la Landa Kongreso</b>	<b>p.13</b>
<b>kongresaj raporto</b> j • Steven CYBULSKI	
Festa kunveno ĉe la plaĝo en Losanĝeleso.	
<b>La Zamenhofa Dimensio</b>	<b>p.15</b>
<b>enigmoj</b> • Kartero WILLIAMS	
Nova eldono por la krucvortenigmuloj.	
<b>Pri la krucvortenigmoj el № 2024:2</b>	<b>p.15</b>
Pro eraro, UE daŭre akceptos solvojn pri la laste aperintaj enigmoj ĝis 2024-12-25.	
<b>La vivo de Peĉjo</b>	<b>p.16</b>
<b>ŝercoj</b> • Timothy BORONCZYK	
<b>Hundo el la neĝo</b>	<b>p.16</b>
<b>facila teksto</b> • Lee MILLER	
<b>Plu juna en IJK</b>	<b>p.17</b>
<b>kongresaj raporto</b> j • Logan HALL	
Kia plezuro, unuafoje viziti Eŭropon inter esperantistoj!	
<b>Participles in Esperanto: The Basics</b>	<b>p.20</b>
<b>language corner</b> • Lee MILLER	
Participles are used constantly in Esperanto, formed by adding one of several endings to a verb.	
<b>La promocio</b>	<b>p.20</b>
<b>rakonte</b> • Timothy BORONCZYK	
Ĝi ŝajnis tro bona, por esti vera ...	
<b>Pri la Universala Kongreso en Tanzanio</b>	<b>p.21</b>
<b>kongresaj raporto</b> j • Brandon SOWERS	
Hakuna Matata, kia mirinda fraz'!	
<b>Kriminala asocio</b>	<b>p.22</b>
<b>vojaĝe tra Usono</b> • Cirilo SANZ, Roz' SANZ	
Rakonteto de la francoj biciklantaj tra Usono.	
<b>Esperanto kaj la franca</b>	<b>p.23</b>
<b>historie</b> • Joshua HOLZER	
Du lingvoj surprize interplektitaj!	
<b>Kvardek du tokiponuloj en Berlino festas per esperanta kanto</b>	<b>p.24</b>
<b>kongresaj raporto</b> j • Ret SAMYS, Sonja LANG	
Esperanto ne estas la sola planlingvo, kies parolantoj kongresis ĉi-somere!	
<b>Mito</b>	<b>p.25</b>
<b>senintenca esperantaĵo</b> • Alena ADLER	
Unu aŭto ja mitologia ekster Eŭropo.	
<b>Mikronoveloj</b>	<b>p.26</b>

# Anoncoj

## 2024 Ballot Results



Thank you to everyone who participated for supporting our organization.

According to the election results, the candidates below were elected to board seats in Esperanto-USA:

- **Mateo Brooks**, Treasurer until 2027
- **Shneur “Ŝneoro” Agronin**, Board Member until 2027
- **Peggy Dolter**, Board Member until 2027
- **Isabel\* Gardener**, Board Member until 2026

The following Esperanto-USA bylaws changes were approved:

- Replace what was formerly §1301 through §1304:
  - “§1301. The League shall manage its funds according to relevant IRS guidelines and requirements and generally accepted accounting principles (GAAP) for non-profit organizations, with the help of independent, accredited accountants. The Board may establish a fund management policy, which shall not contradict those guidelines and requirements.”
  - 91.5% voted in favor
- Add the following language:
  - “§313. Resignation from the Board may be made in writing to any other board member.
  - §314. A board member who is absent from three consecutive, regularly scheduled board meetings shall have their position as a board member reviewed at the next, regularly scheduled board meeting and may be removed from the Board by majority vote.
  - §315. A board member may be removed from the Board for an act or acts directly harmful to the activity of the League by a two-thirds vote of the remaining board members.

- §316. Any decision to remove a board member may be appealed to the following Congress which may reverse the decision by a majority vote.”
- 91.5% voted in favor
- Make modifications to §1101- §1105 to read as such:
  - “§1101. The official organ of the League shall be issued at least quarterly.
  - §1102. The name and format of the League’s organ shall be determined by the Board or by action of the Congress.
  - §1103. Material to appear in the official organ shall be chosen by the Editor with the advice of the President and/or Board as required.
  - §1104. No material of political, religious, ideological, or tendentious nature shall appear in the organ unless the subject clearly pertains to the language problem.
  - §1105. The editor serves at the pleasure of the Board after being appointed by the President and confirmed by the Board.”
  - 92% voted in favor

Current bylaws: <[esperanto-usa.org/en/about-us/bylaws/](http://esperanto-usa.org/en/about-us/bylaws/)>

## New Online Store



We are proud to announce that our new online store is ready! In last year’s member survey, many of you commented that you wanted to see a more modern online store. We have listened to your feedback and highly value your opinions! We hope that you find the new online store attractive and user-friendly, and will discover new and interesting products that will support your progress as an Esperanto-speaker. We’ll be gradually adding more books from our stock, so check the store for new additions from time to time. Members get 10% off using the coupon code **RABATOPORMEMBROJ**. Please do not share the coupon code with non-members.

<[esperanto-usa.square.site/home](http://esperanto-usa.square.site/home)>

# Membership Dues Change & Special Promotion

This summer during our annual conference, the Membership Committee proposed changes to our dues, which were approved by the Board and the Congress. Those changes will include new categories and dues rates to better support the financial soundness of our organization and compensate for inflation. The last time member dues were raised was in 2012 (basic membership) and 2008 (all others). These changes will take effect January 1st, 2025; from then on, memberships will run from 1/1-12/31, to enable joint memberships with the Universal Esperanto Association, which uses a calendar year system.

## NEW DUES AND CATEGORIES:

- Intro membership: \$15 (previously \$5)
- Youth membership: \$30 (previously \$20)
- Joint youth (age 20-25) membership in TEJO & E-USA: \$50 (New - bought separately, \$57)
- Basic membership: \$60 (previously \$45)
- Family Membership: \$90 (previously \$60)
- Joint basic membership in both E-USA and UEA: \$100 (New - bought separately, \$114)
- Patron membership: \$150 (previously \$120)
- Life Membership: \$1200 (previously \$800)

As a special promotion for the remainder of 2024, you can sign up now at the current dues rate, and your membership will be extended through December 2025. Every member who renews before the new year will pay the current rate! You still have time to save money and simultaneously ensure your membership is all set for 2025!

We wholeheartedly thank Amanda SCHMIDT and our dedicated volunteers who worked on these projects!

To learn more about membership and to renew before dues go up, visit here: [mallonge.net/EUSA-2025-renew](http://mallonge.net/EUSA-2025-renew)

## VIRTUAL UEA CONFERENCE:

Similarly, the Universal Esperanto Association is now offering a membership promotion for the rest of 2024 and all of 2025, if you sign up to its 5th Virtual Esperanto Conference (2024-11-28 – 2024-12-1). It's a cinch to sign up for both UEA membership and the Virtual Conference here: [vk.esperanto.net/2024/aligxilo/](http://vk.esperanto.net/2024/aligxilo/)

# Dulanda Kongreso 2025

Kanada-Usona Kongreso 2025 okazos en Toronto!



Ĉi tiu anonco estas adaptita de Lumo 2024:2-4 kun permeso de ĝia redaktoro, Ĵenja AMIS.

Kanada Esperanto-Asocio kaj Esperanto-USA aranĝas kunan Dulandan Kongreson en Toronto, de la 11-a ĝis la 14-a de Julio, 2025. La LKK jam laboras kaj la retejo baldaŭ malfermiĝos. Metu la datojn en vian kalendaron nun!

Oni planas la eventon tiel, ke post la kongreso okazos mallonga postkongresa ekskurso, kaj tiam estos la eblo flugi de Toronto al la UK en Brno, Ĉeĥio tra Vieno. Vieno estas la plej proksima urbo kun flughaveno al Brno (proksimume cent kilometrojn), kun rekta busa konekto el Vieno. Kaj de Toronto al Vieno estas rektaj, ne tro kostaj flugoj. Notu, ke oni esploras la eblojn okazigi NASK ankaŭ en Toronto, en la semajno antaŭ la Dulanda Kongreso.

## Donate to the Esperanto in the USA fund

This is a reminder that the matching donations program through the Esperantic Studies Foundation (ESF) was renewed for 2024; ESF will match a total of \$5000 in donations earmarked for E-USA! When you donate to E-USA through ESF, your donation will be matched dollar for dollar. The matching funds are intended to be used to provide direct benefit to E-USA members and in the past have been crucial to the success of the *Usona Bona Film-Festivalo*. They have also been used to print and mail diplomas for US Esperantists taking the KER exams, and to support US Esperantists attending Esperanto events abroad, among other things. Please donate to help us continue to fund Esperanto activities and programs in the United States! [mallonge.net/ESF-EUSA](http://mallonge.net/ESF-EUSA)

# Spektu la 6-an Usonan Bonan Film-Festivalon

La 26 filmetoj de la 6-a Usona Bona Film-Festivalo nun spekteblas ĉe Jutubo! Membroj estis instigitaj per retroŝto spekti tuj kaj ŝatumi la plej elstarajn; la filmeto kun plej multe da ŝatumoj je 19 Novembro ricevos 200 \$.

Ni fieras pri la rezultoj de la 6-a Usona Bona Film-Festivalo kaj esperas ke vi ĝuos la filmetojn! La gajnintoj estos poste anoncigitaj, inkluzive en *Usona Esperantisto*.



Per subteno de programoj kiel la Usona Bona Film-Festivalo, Esperanto-USA dediĉas sin al la kreado de inkluziva kaj bunta komunumo de esperantistoj en Usono, kaj al la uzado de Esperanto kiel ilo por kreskigi amikajn rilatojn inter ĉiuj popoloj de la mondo.

## Rezultoj post ViA

Logan HALL

### Enkonduko

Ĉi-jare en Aprilo, la Projekta Komitato lanĉis la *Virtualan Antaŭkongreson (ViA)* kiel oportunon engaĝi esperantistojn kun la laboroj kaj novaĵoj de E-USA antaŭ la Landa Kongreso. Kun espero plibonigi ViA kaj fiksi ĝin kiel regulan eventon, ni sendis al partoprenintoj enketon, kies respondojn mi resumas jene kiel la tiama komitatestro.

Aliĝis 102 homoj al ViA, kaj kvankam ne estas registraĵo de efektivaj aliĝintoj, laŭ mia memoro la spektantaro variis inter 10-40 homoj dum la tago, ofte ne la samaj spektantoj

inter programeroj. Ni dankas la 13, kiuj respondis al nia enketo!

## Enketo

### Preferata lingvo

La enketon oni rajtis plenumi aŭ esperante aŭ angle; ĉiuj 13 elektis Esperanton. Tio bone kongruas kun la event-aliĝilo, al kiu 85% raportis sin mez- aŭ alt-nivelaj parolantoj. Tio konfirmas laŭ ni la komunan deziron por pli alt-nivelaj eventoj, pli ofte dum la jaro.

### Kiel vi eksciis pri ViA?

Kiel relative nova komitato (aperinta en 2023), ni penas kompreni, kiu rimedo estas la plej efika por informi la membraron pri ĉi tia evento. Ok (8) el 13 respondintoj eksciis pri ViA de retroŝtmesaĝo, sed la vera proporcio ŝajnas eĉ pli granda: retroŝto estis la lasta rimedo, kiun ni uzis, kaj de tiam, la nombro de aliĝintoj kreskis de 15 al 102 enfine. Nur unu respondinto eksciis per socia retejo, kaj du aliaj pro *Usona Esperantisto*, sugestante, ke ambaŭ estas malpli trafaj rimedoj por komuniki aktualaĵojn, kvankam tio povas dependi de la cirkonstancoj. La ceteraj eksciis per famoj.

### Kiujn programerojn vi ĉeestis?

La respondoj ĝenerale akordas kun mia memoro de la evento. Inter la respondintoj, la plej ĉeestita programero (9 el 13) estis la unua, pri Esperantic Studies Foundation (ESF). Ankaŭ la tuj posta, pri NASK, estis unu el la pli popularaj, laŭ 7 el 13. De tio ni komprenas, ke ĉeestantoj akceptas aferojn frumatene, kaj bonvenigas temojn ekster E-USA mem. Simile popularaj estis la posttagmeza diskuto pri la statuto kaj la nokta prezento pri *Usona Esperantisto*, do la horo ne estis ĝenerala obstaklo laŭ nia rigardo. Sufiĉe popularaj estis la intervjuo de estrar-kandidatoj kaj la parolo de la Centra Oficejo; pli niĉaj estis la prezentoj de komitatoj kaj specialaj fakgrupoj.

### Taksoj

Homoj respondis ĝenerale favore pri ViA entute, donante al ĝi inter 8-10 poentojn el 10, kun unu takso je 6. Ili preskaŭ same opiniis la temaron, plimulte inter 8-10 poentojn kaj unu takso je 5. Oni malplie taksis sian amuziĝon, tamen — la statistika modo estas 7, kun aliaj taksoj preskaŭ egale dividitaj inter 5-10. Oni povas argumenti, ke la evento malpli celis distri kaj pli celis informi, sed ni prenas en konsideron programerojn pli amuzajn.

Ĉiuokaze, ĉiuj 13 respondis, ke ili ĉeestus ViA denove.

## Programeroj ŝatitaj, neŝatitaj, dezirataj

Ni bonvenigis rimarkojn pri programeroj, kiujn oni aparte ŝatis, ne ŝatis, aŭ dezirus vidi en la estonteco. Preskaŭ ĉiu programero ricevis po unu laŭdon, kaj neniun programeron oni malŝatis, kvankam unu petis, ke prezentantoj ĝenerale havu pli da subteno antaŭ la evento pri lingvo-kontrolo. Ni tute konsentas kaj deziras venontfoje akcepti prezentaĵojn pli frue por doni helpon kiel eble.

Por novaj temoj oni proponis prezentojn de regionaj helpantoj, de la junularo, de aliaj specifaj gastoj aŭ famuloj, de spertaj edukistoj, kaj de esperantistoj spertintaj gravan aktualaĵon.

## Pliaj komentoj

Du homoj rimarkis, ke la evento estis tro longa; unu proponis aldoni duan tagon, kaj la alia proponis havi malpli longan virtualan eventon ĉiusezone. Fakte estis nia intenco etendi la eventon al du tagoj, kvankam ni ne povis ĉi-jare pro tempokonflikto je dimanĉo. Ni ĝojas aŭdi, ke *VIA* tiel plaĉis al homoj, ke ili deziras fari ĝin pli ofte; la Projekta Komitato ne pretas ĉi-momente por aranĝi la aferon tiom ofte, tamen ni kuraĝigas al aliaj membroj aranĝi proprajn virtualajn eventojn, pri kiuj ni povos helpi!

Por lasi al homoj libere transpasi inter virtualaj 'ĉambroj', unu proponis, ke ni uzu *Retevent*, la programon kreitan de E@I kaj uzatan interalie de la Virtuala Kongreso de UEA. Ĝi tre plaĉas al mi, persone, do laŭ mi indas esplori ĝin estontece, kvankam tio ŝajne dependos de kosto. Ankaŭ eblas uzi pli koston version de *Zoom*, kiu subtenas plurajn ĉambrojn tiel – mi observis tion de la poliglota fakogrupo por siaj monataj kunsidoj.

Unu dankis la Antaŭkongreson pro maleblo vojaĝi al la Landa Kongreso en Losanĝeleso. Kvankam ni unue rigardis ĝin kiel apetitvekilon por la jara kunveno, *VIA* kredeble povus kreski kiel propra jara evento por tiuj, kiuj ne povas vojaĝi.

---

Ni dankas ĉiujn spektantojn kaj prezentantojn, kiuj partoprenis en *VIA*, kaj ankaŭ ĉiujn, kiuj dividis kun ni siajn pensojn por ĝia pliboniĝo, ĉu per la enketo aŭ rekte esprimite! Se vi ne povis ĉeesti, rimarku, ke [registraĵoj de la evento](#) estas spekteblaj ĉe Jutubo, kaj ni esperas doni al vi alian ŝancon partopreni venontjare!

## Bookmark Design Contest

Karlo GERMANY

How would you like to make some extra money and promote Esperanto while doing it? Esperanto-USA and the Promotions Committee are sponsoring a bookmark design contest for the purpose of drawing attention to our beautiful language.



You are invited to design creative bookmarks to pique the interest of people who have never heard of Esperanto. The goal is to invite them to use the QR code, which will display more information about Esperanto and Esperanto-USA.

The prizes are:

- **First Prize:** \$250
- **Second Prize:** \$150
- **Third Prize:** \$100

So send us up to three amazing, creative designs! Here is what we are looking for:

1. Entries must be submitted by midnight US eastern time on March 31, 2025.
2. The design must be submitted in a format that can be edited with Canva Pro.
3. A PDF version of a design is also required for easy viewing by a panel of judges.
4. All fonts that are used must be free to use and editable in Canva Pro.
5. The bookmark size will be 6" x 2". We have chosen this size because it's convenient for books in Little Free Libraries.
6. All bookmark design entries are the property of Esperanto-USA.
7. No copyrighted designs or elements can be used.
8. Up to three designs can be submitted by each contestant. Each entry must have a unique name and must identify the contestant.
9. All entries must be the work of the contestant. AI (Artificial Intelligence) can be used as inspiration. The exclusive use of AI is discouraged.
10. Entries will be uploaded to a Google Form that will collect information so prize money can be sent. Be sure you submit both a PDF and an editable file. <<https://mallonge.net/EUSA-bookmark-form>>

Here are some criteria for a winning design:

1. An attractive design such that it will not be discarded immediately. Ideally the person who has the bookmark will want to keep it and use it.
2. Only enough text to raise interest to go to a E-USA webpage to find out about Esperanto.
3. Promotes Esperanto while avoiding stereotypes. An example of a stereotype is a green bookmark with a white star.
4. Something unique is desired that motivates people to visit the webpage to find out what Esperanto is.
5. The goal is to expose the public to the word “Esperanto” (language and community) and not to sell Esperanto or recruit people to learn Esperanto. Those seeking more information will decide to learn Esperanto, or not, based on the information they find on the webpage.
6. Each design should allow room for a QR code and wording similar to: “To find out more: [www.esperanto-usa.org/more](http://www.esperanto-usa.org/more)” (exact link and page to come at a later date).
7. Here are some suggested places to put the bookmarks:
  - Public libraries, to be made available to the public.
  - With books available in Little Free Libraries.
  - Bookstores.
  - Events where there is an Esperanto information booth, such as: international festivals, ham radio events, sci-fi conferences, etc.
  - Other places as appropriate.

If you have any questions please contact [karlo.germany@esperanto-usa.org](mailto:karlo.germany@esperanto-usa.org).

Dankon kaj ĝis baldaŭ!

## Alvoko nomumi novajn estraranojn de Esperanto-USA

Ĉu vi estas entuziasma pri Esperanto kaj volas kontribui al la komunumo de Esperanto-USA?

Ni serĉas diligentajn individuojn por servi en la estraro ekde Julio 2025 en la jenaj postenoj:

- Sekretario
- Estrarano (×2)

La estraro, konsistanta el pasiaj kaj lertaj individuoj, gvidas la strategian direkton de la organizo, certigas ke ĝiaj

programoj efike realiĝas, kaj laboras por kreskigi la Esperanto-komunumon. Per lerta estrado kaj vizio, la estraro klopodas krei buntan kaj tolereman medion por Esperanto-parolantoj tutlande. Vizitu [esperanto-usa.org](http://esperanto-usa.org) por pliaj informoj pri la estraro de Esperanto-USA.

Se vi interesiĝas kontribui viajn kapablojn kaj pasion al la estonteco de Esperanto-USA, bonvolu konsideri nomumi vin mem, aŭ iun, kiun vi konas. Necesas esti membro de nia organizo & almenaŭ 18-jaraĝa. Simple kontaktu la Nomuman Komitaton pere de la Centra Oficejo de Esperanto-USA ĉe [amanda.schmidt@esperanto-usa.org](mailto:amanda.schmidt@esperanto-usa.org) antaŭ la 13-a de Januaro, 2024.

Ni kunlaboru por plifortigi nian Esperanto-komunumon!

## 110-a Universala Kongreso en Brno

Pli ol 200 homoj el 40 landoj jam aliĝis al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta de la 19-a ĝis la 26-a de Julio 2025 en Brno. Aliĝu ankaŭ vi ĉe [uk.esperanto.net](http://uk.esperanto.net)!

Oni atentu, ke okazis ŝanĝoj en la datoj de la aliĝperiodoj de la UK. La unua (plej favorpreza) aliĝperiodo nuntempe finiĝas la 30-an de novembro. La tria aliĝperiodo finiĝas la 30-an de junio. Plenajn informojn oni trovas ĉe [UEA.org](http://UEA.org).

La kongresa temo de la 110-a UK estas “Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj”.

La Unua Bulteno konsultebblas rete. La Dua Bulteno aperos baldaŭ kaj enhavos utilajn informojn pri Brno kaj Ĉeĥujo ĝenerale, krom provizoran programon de la Kongreso kaj detalojn pri la mendeblaj hoteloj kaj ekskursoj.

Por partopreni en la 110-a UK bezonatas aliĝi kaj ricevi konfirmon de la aliĝo kun la Kongresa Numero. Individuaj membroj de UEA ĝuas rabaton por la UK-kotizo. Se vi ankoraŭ ne remembriĝis en UEA, vi povas tion fari rekte per la UK-aliĝilo. Aŭ simile per la aliĝilo de la 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK): aliĝo al la VK, kiu okazos de la 28-a de Novembro ĝis la 1-a de Decembro, estas senpaga por individuaj membroj de UEA, kiuj aliĝas al la VK ĝis la 13-a de Novembro, kaj eks-membroj ĝuas specialan ofertan kun duobla aliĝo al UEA 2024+2025 kaj tuja senpaga aliĝo al la VK: [vk.esperanto.net](http://vk.esperanto.net). Estos speciala atento al la 110-a UK dum la 5-a VK.

Bonvenon tuj aliĝi al ambaŭ! Via aliĝo subtenas la organizantojn — al kiuj UEA kore dankas pro la sindediĉo por tiuj unikaj okazoj uzi Esperanton, kiuj estas la UK kaj la VK.

# Redakciaj rimarkoj

de la redakcio • Logan HALL, Alena ADLER

La redakcio pardonpetas pro la malfruenco de numero 2024:3 de *Usona Esperantisto*, kiun ni atendis dissendi komence de Oktobro. Ni dankas ĉiujn legantojn pro viaj pacienco kaj daŭra subteno je nia laboro, kaj la laboro de ĉiuj aŭtoroj. Estas plej grave laŭ ni, ke ni malgraŭ ĉia malfacilaĵo prezentu iliajn verkojn en kiel eble la plej alta kvalito. Ni kredas, ke ĉi tiu numero meritas la atendon, kaj ni esperas, ke vi samopinias.

Ni atentis, ke laŭ la statuto de Esperanto-USA, la bulteno devas aperi minimume kvar fojojn jare. La redakcio atendas nenium malfruigon al N<sup>o</sup> 2024:4 — jam estas en vico pluraj altkvalitaj artikoloj, kiujn ni konservas por ĝi. Kvankam ni ĉesis indiki specifajn monatojn sur ĉiu numero, ni penas sekvi pli-malpli regulan kadencan. Krome, ni rimarkis, ke la kutima du-semajna periodo, inter la limdato por artikoloj kaj la prespreta dato, ne plu taŭgas por nia bulteno, nun trimonata anstataŭ dumonata. En 2025 ni ĝustigos la limdatojn.

En ĉi tiu numero ni lumigas interalie la efikojn kaj postlasaĵojn de uragano Helene, la plej mortiga en Usono post Maria en 2017 kaj Katrina en 2005. Ĝi grandparte kulpas pri la prokrasto de la bulteno, ĉar nia redaktoro Alena loĝas en la regiono plej trafita, kies oficialuloj nomis la detruon “biblia”. Ankoraŭ mankas por diversaj homoj tie trinkebla akvo, manĝaĵoj kaj elektro. Dum tempo sen interreto, ri verkis artikolon pri la kortuŝa sperto.

Kiel eble, la redakcio konstatis, ke ĵusaj kaj aktualaj membroj de E-USA travivis la uraganon. Restas kelkaj tamen, pri kiuj ni ne povis konstati. Bonvolu skribi al bulteno@esperanto-usa.org aŭ al eusa@esperanto-usa.org, se vi estas aŭ konas unu el la jenaj homoj, aŭ se vi volas aldoni nomon al la listo:

- Donner Lohnes
- Roĉjo Ritchey
- Josh Rice
- Debra Brewer

# Jul-Aug Board Activity

de la estraro

## July

**Proposal:** Establish a working group to reassess the regional coordinator system and our relationship with regional groups. The goal is to provide recommendations to the Board on how to support regional groups effectively and optimize the use of regional coordinators and other resources available to Esperanto-USA. Proposal unanimously approved.

**Proposal:** Create a second account dedicated specifically to paying the rent for the UN office. Invoice UEA for the rent at the end of each year, and discontinue accepting donations for rent. Designate the 777 fund for expenses related to the office or for UN-related activities. Proposal unanimously approved.

**Proposal:** Recommend Hans Becklin as the Chief Delegate for the USA. Proposal unanimously approved.

**Proposal:** Create a resolutions committee that is confirmed by a vote of the congress whose main purpose is to collect and refine resolutions from the sessions during the 2024 Landa Kongreso. Confirm Charlotte Burton as chair and Peggy Dolter, Fred Meyer, and Jane Shetsov as members. Proposal unanimously approved.

**Proposal:** Establish an Executive Committee for Esperanto-USA consisting of the President, Vice President, Secretary, Treasurer, and the Executive Director as an Ex-Officio, non-voting member. The Executive Committee shall coordinate League operations between meetings of the Board. The Executive Committee must report on its activities during each regular board meeting and is subject to the direction and control of the full Board. Proposal unanimously approved.

**Proposal:** Authorize the Treasurer to review and approve a budget for the upcoming Usona Bona Film-Festivalo. Proposal unanimously approved.

**Proposal:** Authorize the Executive Committee to work with Brandon Dyer on the proposed specifics of the Usona Bona Film-Festivalo and return to the Board with a proposed written agreement regarding Brandon Dyer’s involvement. Proposal unanimously approved.

## August

No proposals voted on.



# Financa raporto - Tria kvarono de 2024

de la kasisto • Matt BROOKS

Saluton — mi ĝojas prepari kaj konigi al vi la aktualan staton de la financaj aferoj de Esperanto-USA. En la pasinteco, la Centra Oficejo publikigis listojn de elspezoj de la organizo, sed neniu havigis al la membroj la rakonton malantaŭ la nombroj. Mi volas konigi tion, pri kio ni laboras dum la kvaronjaro kaj doni al vi ĉiuj informon pri tio, kiel viaj mondonacoj realigas la mision de Esperanto-USA.

“Kiel li povas doni al ni klaran raporton sen nombroj aŭ bildoj?” eble vi demandas vin mem. Bona demando! Jes, mi estonte fakte publikigos en ĉi tiuj artikoloj kelkajn tabelojn aŭ bildojn. Ne plu, tamen, publikigos ni simplajn listojn de elspezoj, kiuj sen klarigoj malmulte utilos al la membraro. La statuto de la organizo eĉ diras, ke la estraro kaj Centra Oficejo ne diskonigu tian “privilegiitan informon”.

Esperable vi aprezos ĉi tiajn pli infomplenajn artikolojn, sed kiel ĉiam, ne hezitu sendi al mi retpoŝtmesaĝon ĉe [kasisto@esperanto-usa.org](mailto:kasisto@esperanto-usa.org) se vi havas demandojn aŭ komentojn.

## Ekde la lasta bulteno...

Multego jam okazis ekde Junio! Ni kontraktis kun profesia kontisto kaj ŝi laborplene transdonis niajn financajn rikordojn de *QuickBooks Desktop* al *QuickBooks Online*, moderna kaj ofte uzata interreta programo. Ŝi lastatempe finis certigi la informojn de 2023, sed ŝi ankoraŭ certigas la informojn el la unua duono de 2024, kaj enigis la informojn el Julio kaj Aŭgusto.\* Ni ne volis publikigi tableton de necertigitaj nombroj en ĉi tiu unua raporto, sed estonte mi dividus tabletojn, kiuj montros la staton de la aktualaj elspezoj kontraŭ la planita buĝeto.

Ĉi tiuj raportoj montros ankaŭ la enspezojn en niajn fondusojn, kvankam ni ankoraŭ klopodas klasifiki ĉiujn ilin laŭ iliaj destinitaj uzoj. Ekzemple, pluraj fondusoj estas dediĉitaj al edukaj celoj laŭ la instrukcioj de siaj fondintoj. Tiuj fondusoj devus esti enspezfontoj por la edukado-programo de Esperanto-USA, kies celoj inkluzivas subtenadon de la funkciado de NASK, provizadon de financa helpo por ke membroj ĉeestu NASK-on, kaj kreadon de novaj edukaj rimedoj. Kontraŭe tamen al pasintaj diskutoj ene de la organizo, subteni la funkciadon de Esperanto-USA ne plenumas per si mem edukon celon. Nur fondusoj specifitaj por ĝenerala funkciado de la organizo, aŭ havantaj neniujn ajn

instrukciojn, povas esti uzataj por subteni la ĉiutagajn funkciojn de Esperanto-USA.

La estraro pridiskutas kelkajn rimedojn por komuniki pli da financa informo ekster la bulteno, verŝajne per retpaĝo en nia nova retejo. Atendu anoncon tiam, kiam ni trovos la plej bonan lokon aŭ rimedon por fari tion! Dankon!

\*Redakcia noto: Ĉi tiu artikolo estas aktuala je Septembro.

## Rimarko el la ruĝtapiŝa evento

kino • Brandon DYER

Ni absolute ĝuis persone ĉeesti unu el la plej bonaj jaroj por filmetoj en Esperanto. Ni esprimas nian koran dankon al la organizantoj kaj filmistoj de la *Usona Bona Film-Festivalo* pro la realigo de tiu ĉi mirinda evento. Ni, ĉe Ana.so, esperas ke ni povos subteni ĉi tiun tradicion tra la venontaj jaroj.

It was an absolute delight to witness one of the finest years for Esperanto filmmaking in person. We extend our heartfelt gratitude to the organizers and filmmakers of the American Good Film Festival for bringing this remarkable event to life. We at Ana.so hope that we can help to keep this valued tradition in place for years to come.



Alex MILLER, Brandon SOWERS, Brandon DYER, and Jonathan BYRD at the red carpet premiere of the 6th American Good Film Festival in Atlanta.

# Heleno, *Bonvola Filozofigisto?*

informado • Alena ADLER

## Trankvilo antaŭ la ŝtormo

Oni tute ne antaŭvidis, ke tia detrua uragano forte trafus nin, en Apalaĉujo. Neniom ajn da preparoj povis sufiĉi, por eskapi la efikojn kaj post-efikojn. Eĉ lokaj farmbienistoj, kiuj regule sin provizas de legomoj, viando, eĉ akvo — homoj, kiujn oni supozu pretaj laŭeble bone travivi ajnan katastrofon — suferis tian detruon, post kiu okupos jardekon por rekonstrui. Mi iam antaŭe loĝis en Florido, do komprenis, kiel oni sin pretigu antaŭ uragano: oni plenigu bankuvojn, benzinujojn ... kaj, en la plej ekstremaj okazoj, almetu glubendon en iksoformo al la fenestroj — kaj malfermetu fenestron en la transa flanko de la domo, por eviti damaĝon pro ŝanĝoj en aeropremo.

Tio estis la procedo en Florido. Mi supozis, ke floridaj preparoj certe ne necesu en okcidenta Norda Karolino, ĉirkaŭata de montaro ekestinta en Pangeo. Sufiĉe fortikaj bariloj. Malkonvene tamen, nia akvostacio emis subakviĝi — jam dum la pasinta vintra feritempo, la akvotuboj nenian guton provizis dum naŭ tagoj — do ni plenigis iujn sitelojn kaj kuvojn. Efektive, pro la vento-prognozo, ni bildigis al ni kelktagan elektropaneon, sed ĉifoje ni vere ne atendis akvopaneon.

Sed neatendite, pluvegadis dum la tagnoktoj antaŭ la alveno de la uragano, Helene. Dum 72 horoj la regiono ricevis 31 colojn, aŭ 80 cm, da akvo. La tero sorbis akvon ĝis profundo de naŭ coloj, aŭ preskaŭ 23 cm, jam antaŭ ol la uragano alvenis. Dume, homoj el apudaj ŝtatoj alvenis, por eskapi la antaŭviditan kurson de la uragano ĉe ili. Sed, Helene faris siavole. Uraganoj malofte sekvas ordonojn, nek de markilaj indikoj sur mapoj, nek de la plej lertaj meteorologoj. Helene sovaĝis jen kaj jen tra ses ŝtatoj, kaj ellasis sian plenan forton al la kantonon Buncombe.

## Biblia detruo

La riveroj ne povis alpreni ĉiom de la akvo. Akvonivelo de la rivero Swannanoa altiĝis ĝis pli ol 26 futoj (preskaŭ 8 metroj), pli alta ol la inundego de 1791. Tuŝapude de Buncombe, en la urbeto Fletcher, la rivero altiĝis ĝis 30 futoj (9 metroj), pli ol sia alto tuj post la uragano Frances en 2004. Aŭtoj, bienbestoj, domoj, homoj, entreprenoj, pontoj, kaj vojoj estis subakvigataj aŭ forlavitaj. Iuj personoj ankoraŭ serĉatas, sed jam 232 mortoj estas konfirmitaj. El 98 mortoj en Norda Karolino, 43 okazis en Buncombe, kvaroble pli ol en ajna alia kantonon. En antaŭurbo de Asheville, familio kun domoj unuj apud la aliaj perdis 11 parencojn en terglito de apuda monto sur la

domaro. Ankoraŭ ne eblas scii pri la tuta vivperdo, nek pri la financa perdo. En la 28-a de oktobro, la registaro anoncis unu miliardon da dolaroj por helpi travivintojn de Helene kaj de la sekva uragano Milton pri iliaj plej tujaj bezonoj. Oni plu taksadas la detruon, sed financa risktaksisto *Moody's* raportis ke kostoj pri Helene povus esti tiom alta kiom 34 miliardoj da dolaroj.

La detruo de servoj dum la unuaj tagoj estis absoluta. La ventoj faligis elektrokablojn kaj arbojn, kiuj blokis multegajn vojojn kaj ŝoseojn. Ne eblis iri, eĉ per vojoj ne forlavitaj, ĝis oni povis forigi tiujn. Pli ol tri milionoj da homoj suferis elektropaneon pro Helene, 95 mil en mia kantonon. Multegaj akvotuboj estis elfositaj el la tero per la akvofluego — akvo kura, sed ne pura — kaj rompita, eĉ forportitaj, probable ĝis Tenesio, samkiel diversaj aliaj aĵoj kaj anoj de okcidenta Norda Karolino. Ĉe iuj benzinejoj, la subteraj ujoj enlasis akvon kaj ruinigis la benzinon. Ĉiokaze ne estis elektro por pumpi, nek por ebligi pagadon. Superbazaroj, kiuj ne inundiĝis, ne povis funkcii sen elektro, nek konservi siajn varojn malvarmaj. Restoracioj ne povis leĝe funkcii sen akvo por manlavado de la kuiristoj, des malpli labori sen ingrediencoj aŭ elektro por kuiri. Bankoj fermiĝis, ĉar la interreta konekto komplete paneis. Kiel Zamenhof diris: “Malfeliĉo kaj batoj ĉiam venas kun fratoj” — ne nur interreto mankis ... krome, ĉiuj telefonkonektoj paneis; la turoj estis tiom subfositaj de akvo, ke la riparistoj ne povis atingi eĉ tiujn, kiuj staris, por taksi kaj fari riparojn.

Sed riparistoj alvenadis — kaj abundaj kaj diversaj — interalie elektrokablistoj de pluraj diversaj ŝtatoj, kaj el diversaj provincoj de Kanado. Ni en Apalaĉujo neniam antaŭe konsideris Kanadon kiel nian najbaron. Sed jen homoj kun la plej necesaj spertoj kaj lertoj, el tiel foraj lokoj, kiuj sin dediĉis al la multaj gravaj taskoj bezonataj. Dum la unuaj tagoj, kablitoj sekurigis tiujn, kiuj atakis per ĉensegiloj la falintajn arbojn, kiuj blokis vojojn. Urĝe, tagnokte, oni serĉis travivintojn. Post kelkaj tagoj — nur netravivintojn. Tiu tasko rapide iĝis plej urĝa inter ĉiuj, pro rabobestoj — aparte rabobirdoj.

Ĉiaspecaj helpantoj alvenis diversmaniere, iuj kadre de privataj helpogrupoj. Flegistoj kaj fajrobrigadistoj, soldatoj kaj rezervistoj, profesiuloj kaj spertuloj pri ĉia fako bezonata — kaj kompreneble, la administrantoj de la Landa Kriz-Administra Agentejo, akk FEMA. Oni emas pensi pri iaj superherooj, kiam oni imagas la helpantojn de FEMA, sed efektive, ili estas administrantoj, kaj ne tiuj, kiuj, ekipitaj per botoj kaj gantoj, entreprenas la fizikan

savadon de la viktimoj, nek la sekurigadon de la regiono. La FEMA-dungitoj estas tiuj, kiuj organizas la diversajn helposervojn. Ni plu profitas de la stokejoj, kie oni disdonadas trinkakvon kaj soldatmanĝaĵoj (MRE) ekde tiam, kiam la vojoj trapaseblis por la ricevontoj. La stoko mem alvenas per helikoptero al la diversaj disdonejoj multfoje tage. La sono de helikopteroj estis preskaŭ konstanta afero dum la unuaj semajnoj — de malgrandaj, private posedataj, ĝis la grandegaj militaj helikopteroj, kiel la durotora *Chinook*. Ni lernis la sonon de ili ĉiuj, dum ni iradis plurfoje tage preni akvon el roĵo en mia najbarejo por tralavi la necesejajn pelvojn. Homoj sen tia akvofonto devis iĝi pli kreemaj.

Tamen, Zamĉjo provizis nin per proverboj kontraŭ ĉia ajn situacio. Laŭbezone, mi alprenis “Mortinta serĉu ĉielon, vivanta ian celon”, kaj “De plendo kaj ploro ne forigas doloro” — sed pli ol iu alia, “Kiu havas bonan najbaron, havas bonan tagon”. Tiu lasta pli veris, en la tagoj tuj post Helene, ol iam ajn antaŭe en mia vivo. Tiam, kiam la interreto paneis, ni levis la nazojn de la telefonoj, fine ĉirkaŭrigardis, kaj ververe vidis unu la alian. En ĉiuj najbarejoj, homoj demandis unuj la aliajn kun plenkora sincero, “Kio mankas al vi?” kaj, “Kiel vi fartas?” Por usonanoj, tiu dua demando ĝenerale servas kiel saluto, sed eksternorme ne dum tiu ĉi malfacilego — oni vere prizorgis unuj la aliajn. Ĉiuj *aktive* elserĉis manierojn, per kiuj ili povis helpi, ĉiu laŭ sia kapablo. Ekstis interna sinpelo fari tiel — dum kapitalismo nenion povis, homoj, kiuj nenion antaŭe aŭdis pri la donac-ekonomio, iel tuj nature funkciigis multajn elementojn de siaj vivoj per ĝi.

Oni povus *supozi* la sperton kiel inter la plej malhelaj periodoj en mia vivo. Foje, mi lasis min pensi pri la plej malbelaj faroj de la homaro, kaj sekve iom senesperigi pri la homa naturo. Konfesende, mi multe pli certis pri la beleco de homaranismo kaj la interna ideo de Esperanto ol pri ilia realisma utilo. Mi foje sufiĉe pesimismis pri ĉio ĉi, por demandi min, ĉu Esperanto ne jam sufiĉas en si mem, sen aldoni filozofion. Tamen — dum la unuaj semajnoj post Helene, mi povis ekvidi la eblon de pli bela homa naturo.

## Homaranismo en izoleco

Unu ekzemplo de tiu eblo, kiun mi ekvidis, temis pri mia maljuna najbarino, iom lamiranta, kiu foje dum la jaroj indikis jen sian konsterniĝon, jen sian fidomankon pri najbaroj de aliaj rasoj. Iun tagon, eble semajnon post la uragano, ŝi iris al la roĵo, sitelo-enmane. Viro, kiu loĝis aliflanke de la roĵo, alproksimiĝis, dirante, “Ne, ne!” Li ne multe parolis la anglan, kaj ŝi klarigis al mi poste, ke en tiu momento ŝi supozis, ke li ne volis, ke ŝi prenu la akvon, kiun ŝi bezonis. Sed tiam li aldonis, “Mi! Mi!” gestante al si mem, kaj al la sitelo. Ŝi fine ekkomprenis — li ne volis, ke ŝi

devu mem levi la pezan akvositelon. Li insistis porti la sitelon al ŝia porĉo. Ili interŝanĝis malmultajn vortojn, anstataŭe helpgestojn. Ŝi dankegis. Ili interŝanĝis nomojn. Li volis scii, ĉu li rajtas brakumi. Malmultajn brakumojn ŝi ricevas, ŝi sciigis al mi, vivanta tute sole — ŝi jesis. La sekvan matenon, ŝi venis el sia pordo, kaj vidis, ke iuj aliaj siteloj sur la porĉo, kiuj staris malplenaj la antaŭan vesperon, enhavis akvon. “Devis esti tiu Almonzo!” ŝi diris al mi kun kapskueto kaj rideto.

Alia najbaro spertis ion mirige similan. Ŝi unutage haltis de stirado por vidi tion, kio haveblis, kie grupo montris ŝildojn al aŭtistoj pri “Senpagaj Manĝaĵoj”. La grupo staris apud la vojo antaŭ preĝejo, disdonantaj manĝaĵojn. “Efektive,” ŝi rakontis poste, “mi unuavice ne haltis, kiam mi vidis tiujn minoritatumojn.” Tamen, alveninte hejmen, ŝi repensis, ĉu estus saĝe ignori la oportunon ricevi ion. Eble plia sento de bezono dum kriza periodo influis ŝian decidon. Eble sentiĝo trafis ŝin, ke kaj ŝi kaj ili estis homoj kune spertantaj la saman defion. Aŭ eble estis pro la manko de la pli kaj pli oftiganta “Du-Minuta Malamo” de Orwell, kiu komplete paneis kun la interreto kaj telefonkonekto ... Ŝi denove eniris sian aŭton por reiri al la loko. Tie, ŝi ricevis de ili ne nur la atenditajn manĝaĵojn, sed ankaŭ brakumojn, kaj vortojn de subteno, kiujn ŝi bezonis eĉ pli. Ŝi konfesis al mi tiun posttagmezon, ke antaŭe, ŝi estis inter tiuj, kiuj volis konstrui ekskludan muron. Ŝi supozis, ŝi diris, ke “tiaj homoj” nur senigas “nin” de tio, kion ni bezonas. “Kia mi supozis min?” ŝi ekploris, demandante, “Kiel mi ne sciis?” — pri homaranismo, esperantisto komprenus. Sed ne estis la momento por rakonti filozofiaĵojn. Mi nur povis brakumi ŝin kaj diri, “Vi jam sciis, en via koro. Aliokaze, unusola tia sperto ne povus ŝanĝi vian opinion tiom. Vi nur bezonis esti inter homoj, sen la konstanta bruado de la televido. Tiam vi tuj komprenis, tute nature.”

## Utopio malgraŭ ĉio

Malgraŭ grandskala detruo kaj nekredibla malfacilo tuj post Helene, dum la foresto de telefonkonekto kaj interreto, nia sperto strange estis iamaniere ideala — kvazaŭ ia utopio ekzistis ĉi tie. Temis pri portempa homa korkonekto, tiagrada, ke homaranismo supozu, ke homaranismo enŝutiĝis en ĉies kapojn, nur per la ventegoj de Helene. Sed kiam ripariĝis tiuj komunikservoj, kiuj ebligas al ni interkonektiĝi kun homoj pli foraj, la situacio denove renversiĝis. Dum tiu kompleta komunikpanejo, mi — dubanto pri ĉia filozofia flanko de mia esperantisteco — komencis homaranistiĝi, per propraokulaj pravigoj. Klare videblis, kiaj ni estis, kiam mankis ekstera influo de la ekosistemo — eĉ eĥosistemo — de ĉies preferata novaĵprovizantaro. Senigitaj de tio, neniuj demandis, “Por kiu vi voĉdonos en la novembro balotado?” Neniu

interesiĝis. Nia okupo estis najbareco — efektive, mi devis konfesi, homaranismo.

Sed kiam komunikado kun la ekstera mondo denove eblis, la amaskomunikilaro, kiun mi uzadas por konektiĝi kun samideanoj el la tuta mondo, eĉ por kor-al-kore konektiĝi — vekigis por detrui tiun utopion, kiu tiel nature stariĝis antaŭe. Unuavice, estis sufiĉe ŝoke, subite povi vidi, precize kiom da detruo alportis la ŝtormo. Sed malfeliĉo malofte alvenas sole; ni estis denove sub la influo de niaj preferataj raportistoj tuj antaŭ la balotado, kiuj prezentis malhelpe variajn raportojn pri nia situacio. Certaj tiom konsternis iujn lokanojn, ke tiuj eĉ evitis la helpon de FEMA, kiun ili bezonis, rajtis, kaj se ne kontraŭinfluitaj, povus akiri.

Pasos longa tempo, ĝis aferoj renormaliĝos en mia regiono. Unu hako kverkon ne faligas. Elektro-servo pli kaj pli stabiliziĝas, sed plu okazas interretaj paneoj, eĉ 24-horaj. Lastatempe, la plej proksima portempa publika lavejo, starigita por ĉiuj ni senakvuloj, plusendiĝis al alia kantono, dum nova — kun pli da servoj, eĉ flegista konsultejo — stariĝis por ni. Plu mankas viando en la superbazaro. Ni informiĝis, ke neniam estos ĝis fino de bolig-ordono pri la akvo, koncerne de publika sano. Butero iĝis or-valora ŝmiraĵo. Sed instruas mizero manĝi panon sen butero. Dum mi skribas, centoj da domoj plu malhavas elektron. Feliĉe, ke la interreto revenis, ĉar ekde tiam mi povas indiki al amikoj pri mia bonfarto, tujelsendi, kaj plej preme, urĝe redakti por *Usona Esperantisto*. Malfeliĉe, povas esti, ke la homaranisma utopio, okazinta dum la komunikpaneoj, estis nur portempa se bela miraklo.

Eble la homaro ne kapablos efektiviĝi homaranismon, dum ni ĉiuj dividiĝas per pli kaj pli partizana politiko. La postlasaĵoj de Helene influis nin jen bone jen malbone, kaj mi esperas, ke la bonaj efikoj restos al miaj najbaroj, same kiel ili restos al mi. Mi ne plu povos pensi pri homaranismo kiel nenio pli ol dezirinda sed nepraktikebla ideo. Mi memoros la pruvojn, kiujn mi spertis tuj post Helene, ke homaranismo efektive estas parto de niaj naturoj, kiam malhelpoj ne ĝenas. Sed plej grave mi memoru, kiel homoj ĉi tie efektiviĝis homaranismon. La povo disvastigi ĝin tiom forte, kiom la uragano Helene, restas en la manoj de ĉiu individuo. La plej efika ago, por solvi malamon, estas tutsimpla — **helpi**. Kaj por trovi la okazon, oni nur levu la nazon de la telefono kaj rigardi ĉirkaŭe. La plej ĉiutagaj helpoj detruis la antaŭjuĝojn, kiujn miaj najbaroj tenadis jam dum jaroj, eĉ jardekoj. Homaranismo ne temas pri nur iuj filozofiaj konsiloj, kiujn Zamenhof verkis antaŭ pli ol jarcento — sed pri io praktikebla per naturaj ĉiutagaj helpagoj. Nia alkroĉiteco al konstanta interreta distrado ne estas nia plej natura stato. Sen ĝi, homoj komencis funkcii laŭ la principoj de homaranismo eĉ ne konante ĝin, same kiel homoj nutris la donac-ekonomion, neniam antaŭe uzinte ĝin. Multfoje, dum tiu katastrofa periodo, kiam mi eniris la urbon, mi aŭdis homojn en la strato proklami sin anoj de unu sama homaro unuj al la aliaj, kaj bedaŭri la ŝajnan mankon de tiu bela ideo antaŭe. Mi konvinkiĝas, ke homaranismo ne estas nur por esperantistoj, sed por ĉiuj, kiuj vidas, ke ĝi plibonigas sian vivon. Helene donis al ni, en la mezo de ĝia detruo, la okazon vidi, kiom ni ĉiuj povas profiti de homaranismo. Helene donis al mi la kapablon, post jardekoj en la movado, finfine konfesi homaranismon. Kaj pro tio, mi povas danki ĝin.

# Postkongresojaj notoj el la Landa Kongreso

kongresaj raportoj • Steven CYBULSKI



Foto de Alekso MILLER

Post surprize longa promeno, ni atingis la mezon de la plaĝo. Ni ankoraŭ povis aŭdi la esperantan version de iama furorkanto, kiun ludigis la diskĵokeo ĉe la restoracio, kie ni ĵus vespermanĝis. La aero estis malvarmeta, kaj mi volis havi ion pli varman ol la T-ĉemizo, kiun mi portis. Krom tio mi estis tre kontenta. Ni pluiris al la bordo, kaj iom vadis en la Pacifika Oceano. Dum la suno subiris kaj mi babilis kun miaj kunuloj, mi rimarkis, ke la ondetoj ĉe niaj piedoj plenis je nekalkuleble multaj flosantaj sableroj, kiuj kune aspektis kiel fumo sub la akvo. Mi tiel ĝojis esti tie, kaj tuj sciis, ke mi longe memoros tiun momenton kun granda dankemo.

Sed kial mi estis tie? Mi facile povus maltrafi tiun belegan sperton, sed feliĉe mi decidis partopreni la ĉi-jaran usonan landan kongreson ĉe California State University, Dominguez Hills en Carson, Kalifornio. Mi ekiris al la kongreso vendredon, la 12-an de Julio. Mi tre agrable pasigis longan parton de la flugo al Kalifornio legante en PMEG pri la uzo de *si* en kompleksaj frazoj. Foriginte kelkajn dubojn pri la ĝusta maniero uzi tiun problemdonan

pronomon (kaj kun kelkaj novaj demandoj pridiskuteblaj kun aliaj harfendemuloj), mi elaviadiliĝis kaj buse, trajne, kaj alibuse veturis al la kongresejo.

Per la Telegramo-grupo por kongresanoj, mi sciis, ke mi unue iru al la universitata biblioteko. Kiam mi vidis la verdajn balonojn kaj sagojn, mi sciis, ke mi iras en la ĝusta direkto. En la biblioteko mi sufiĉe facile trovis la akceptejon, ricevis mian nomŝildon, kaj komencis babiladi kun la aliaj partoprenantoj. Kelkajn el ili mi unue renkontis antaŭ multaj jaroj, sed jam delonge ne vidis. Kun unu mi ŝercis pri la grizaj haroj, kiujn ni ambaŭ iel senintence akiris inter tiam kaj nun. Aliajn mi ekkonis lastatempe per retaj eventoj kaj videobabilado, kaj estis plezuro babili kun ili la unuan fojon en la malvirtuala mondo. Tamen la plimulton de la ĉeestantoj mi tute ne konis antaŭ la kongreso. Mi estas introvertulo, sed mi volis plene kapti la okazon uzi la lingvon ekster Zoom-ĉambro, do mi penis dum kelkaj tagoj forgesi miajn ordinarajn tendencojn kaj konatiĝi kiel eble plej multe kun la aliaj kongresanoj. Feliĉe, mi trovis ilin tre amikemaj, kaj mi ege

ĝuis niajn konversaciojn. Iuj temis pri la du komunaj interesoj, kiujn havas pli-malpli ĉiu esperantisto: Esperanto mem, kaj la kulturo, kiu floras pere de la lingvo. Ni parolis pri tio, kial kaj kiel ni lernis Esperanton, kion ni faras per ĝi, kiujn Esperanto-librojn ni plej ŝatas, ktp. Ŝercoj kaj aludoj tute ne kompreneblaj ekster Esperantujo abundis, kaj mi ĝuis la kontraston kun mia normala, malverda vivo. Sed viglajn diskutojn vekis ankaŭ multaj temoj, kiuj ne rekte rilatis al Esperanto: sukcesoj kaj malsukcesoj en la lernado de aliaj lingvoj, laboro, hobiaj, revoj, religio, kaj aktualaĵoj estis nur kelkaj el ili.



Foto de Peggy DOLTER

Dum la plejparto de la kongreso, ni estis en unu grandega, longa ĉambro en la biblioteko. Murgrandaj fenestroj enlasis multe da sunlumo, kaj mi trovis la ejon tre taŭga kaj komforta. En unu malgranda apuda ĉambro troviĝis la libroservo, kaj en alia la universitataj arĥivistoj prezentis kolekton de esperantaĵoj. Promendistance de la biblioteko estis universitata apartamento, kiu servis kiel nia gufujo, kie malfruvespere kongresanoj kolektiĝis por babilado kaj tabloludoj.

Vendredon posttagmeze komenciĝis “mini-NASK”, Esperanto-kurso por kongresanoj. La nomo devenas de la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK), kiu okazis ĉi-jare en Raleigh, Norda Karolino. Mi ne partoprenis, sed laŭ tio, kion mi aŭdis, ĝi estis tre sukcesa. En la vespero okazis du interkonaj ludoj ekstere. Estis multe da kurado kaj ridado kaj, je la fino de la dua ludo, ĉiu montris al la grupo ian talenton. Estiĝis amuza kaj amika etoso, kiu karakterizis la kongreson.

Sabaton kaj dimanĉon dum la tago okazis la kongresaj programeroj, inkluzive de pluraj kunvenoj kaj diskutoj pri diversaj flankoj de la agado de Esperanto-USA. Ofte estis almenaŭ du programeroj okazantaj samtempe, do ne eblis partopreni ĉion. Mi tamen tre ĝuis ĉion, kion mi elektis: inter aliaj tre interesaj spertoj mi partoprenis lecionon pri origamio, lernis kiel krei krucvortenigmojn, kaj aŭskultis mirindan rakonton pri vojaĝado per Pasporta Servo. David Jordan, la ĉefparolanto, pensige prelegis pri la vortoj *revo* kaj *fantazio*, kaj poste verve laŭtleĝis unu el siaj spritaj rakontoj pri imagita historio de Esperantujo.




Foto de Rafa NOGUERAS

Sabaton vespere ni iris per buso al Seal Beach por festo ĉe la plaĝo. Tie ni ĝuis bongustan vespermanĝon, dancigan muzikon, kaj belegan pejzaĝon. Plurfoje mi aŭdis, ke la etoso tie similis al la etoso ĉe junularaj renkontiĝoj en Eŭropo. Post la vespermanĝo, kiam mi promenis kun malgranda grupo kaj vadis en la oceano, mi sentis min profunde feliĉa, ke mi decidis veni al la kongreso.

Dimanĉon vespere okazis la solena fermo de la kongreso, interesa prelego pri Esperanto en Holivudo, kaj la arta vespero, dum kiu la kongresanoj regalis unu la aliajn per muzikado, dancado, kaj aliaj spektakloj. La sekvan matenon, mi reiris al la flughaveno. Mi estis sola, sed dezirante iom prokrasti la finon de mia kongresa sperto, mi trovis aliajn kongresanojn helpe de la Telegramo-grupo. Mi atendis mian flugon kun ili. Finfine mi devis ilin adiaŭi, kaj alfronti la malpli solenan sed pli definitivan fermon de la kongreso.

Fine de la kongreso, mi plurfoje aŭdis la vorton *postkongresozo*. Ĝi estas nomo por la malgaja sento de soleco, kiun multaj spertas post kongresoj, kiam novaj kaj malnovaj amikoj estas malproksimaj, kaj oni estas foririnta de Esperantujo. Kvankam estis bone reveni hejmen kaj brakumi denove miajn karajn infanojn kaj edzinon, postkongresozo ja iugrade trafis min; mankis al mi la aliaj kongresanoj kaj la belaj tagoj, kiujn ni kune ĝuis. Nu, se tiu kromefiko estas la postsekvo de partopreninda kongreso, mi povas akcepti ĝin. Mi elkore gratulas kaj dankas la organizintojn de la ĉi-jara Landa Kongreso, kaj esperas, ke la partoprenontoj de la sekva kongreso spertos simile sukcesan aranĝon.

# La Zamenhofa Dimensio

enigmoj • Kartero WILLIAMS


Jen nova krucvortenigmo danke al Kartero WILLIAMS! Inter la solvintoj ni lotumos rabaton je 5 \$ de la retbutiko. La redakcio akceptas solvojn ĝis **25 Decembro**. Ni ne plu akceptas solvojn per la retejo Amuse Labs, sed ĉi tiun vi rajtas plenumi enrete <<https://mallonge.net/UE-2024-3-enigmo>> kaj sendi al *UE* aŭ kiel foton aŭ kiel presitaĵon.

## Horizontale

1. Reven' al polvo
7. Televid-peril'
11. Trovi neserioza
12. Konsistaĵo de la farbo sur *La Gioconda*
13. Donas formon, premade permane
14. Ekkria boj
15. Flosaĵ' en misosupo
16. Enhavaĵ' de luksa kuseno
18. Verk' kiel Herezulo
19. Barata spicmiksaĵo
20. Sinsekv' de pensoj, figure
21. Limigita kapabl'
22. Armil' de mefito
26. La skribaĵ' "neniujn badaŭrojn" (tiele)
27. Tia, kia estas *Kuriero Internaciona*
29. Nitrogen'
30. Sordidaj
31. Blua kiel omaro
32. Kutima dividaj' de pico

## Vertikale

1. Kontrakt'
2. Brak-fibulo
3. Plej malalta briĝ-emblem'
4. Miru! Pensu! \_\_\_\_\_!
5. Amiko de Marina
6. Ferma signalo
7. Interlingvo el dialekto
8. Ligno-artist': Andrew Gronholdt
9. Diligenta koleg': Frans Schoofs
10. Aviadila lertaĵ'
17. Obstinul'
18. Kabo en Masaĉuseco
19. Tia, kia estas aŭto, kiu ne startas
20. Naŭza odor'
21. Tia, kia estas franca vokalo
22. Flora simbol' de Venuso
23. Senkarna
24. Duon-bronz'
25. Ludil' uzata kiel muzikgrupa titolo
26. Radik' de Polinezio
28. Mezur' en la Z-a dimensio



## Pri la krucvortenigmoj el № 2024:2

La redakcio bedaŭras informi, ke aperis problemo pri la retejo Amuse Labs, kiun *Usona Esperantisto* komencis uzi ĉi-jare por havigi krucvortenigmojn rete. En somero, Amuse Labs neatendite forprenis de enigmo-aŭtoroj la rajton rigardi ĉies solvoprovojn sen pagi 250 dolarojn monate. Kiam ni laste kontrolis, la enigmo *1905* havis kvar provojn; *Laŭdu la tagon nur vespere* kaj *Okazas* havis po unu. Tamen ne plu eblas niaflanke vidi, kiuj submetis la provojn, kaj ĉu ili estas ĝuste solvitaj.

Dum la antaŭvidebla estonteco, *UE* akceptos solvojn nur poŝte aŭ retroŝte; adresoj troveblas en la kolofono. Por faciligi la solvadon, krucvortenigmoj daŭre haveblos ĉe Amuse Labs ĝis ni trovos alternativan retejon, sed estos necese foti aŭ printi plenumitan enigmon kaj sendi rekte al la redakcio.

Ni atentigas, ke premioj estis ofertitaj ĉi-okaze. Por justeco, ni **plu akceptos enigmo-solvojn pri № 2024:2 ĝis la 25-a de Decembro**, same kiel la ĉi-numera enigmo. **Se vi plenumis, parte aŭ tute, tiujn enigmojn per Amuse Labs, kontrolu la respektivajn retpaĝojn por eventuale konservitaj plenumoj**, kaj vi rajtas fini kaj sendi al la redakcio ĝis 2024-12-25.

# La vivo de Peĉjo

Ĝercoj • Timothy BORONCZYK



# Hundo el la neĝo

facila teksto • Lee MILLER

Hanna kaj Johano, kiuj renkontis strangan hundon en la arbaro, sidis malgajaj en la salono.

La hundo pravis, ke neniu kredos la rakonton.

Estis vespere, kaj Panjo kaj Paĉjo iris en la urbeton por aĉeti kelkajn aferojn. Ankoraŭ lumis krepuske ekstere.

Ili rigardis la blankan neĝon, kaj sen averto la vizaĝo de la bruna hundo aperis en la fenestro.

Ili kuris al la pordo, kaj enlasis ĝin.

Panjo kaj Paĉjo trovis la du dormantaj sur la sofo, kaj inter ili malplenan, rondan spacon, iom malsekan, kvazaŭ pro degelinta neĝo.



# Plu juna en IJK

kongresaj raportoj • Logan HALL

Kvin jarojn mi serĉis la kernon de Esperantujo — tie, kie la ‘interna ideo’ praktiĝas. Tie, kie la eminentuloj de nia movado troviĝas. Tie, kie esperanta kulturo floras. Kiel multaj en ĉi tiu epoko, mi esperantistiĝis en la Interreto, sed tuj mi sentis tion nur vestiblo en Esperantujon, aŭ kamparo ĉe ĝia rando. Delonge mi volis transiri ponton de la reta komunumo al la urbocentro de Esperantujo. Marŝante tien, mi engaĝis min kun Esperanto-USA por helpi al la verduloj de mia hejmlando, kaj ankaŭ por gajni necesajn spertojn kaj lertojn en la movado.



Tial mi emis komplezi, kiam en Februaro, Brandon SOWERS malkovris al mi oportunon partopreni en la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Litovujo. Mi sciis absolute nenion pri Litovujo, kaj mi konfesas, ke ĝin mi neniam konsideris por mia unua vizito en Eŭropo, sed evidentiĝis, ke la destino elektis min. Ĉiuokaze, mi estis feliĉa pro la oportuno reprezenti mian landon kaj konatiĝi kun aliaj samideanoj.

Tamen mi ne konsciis, ĝuste kiel samideaj ili estus, ĉar mi ankoraŭ ne komprenis la celon de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Usono apenaŭ havas apartan junularan organizon, kio grave reprezentas laŭ mi maldividemon kaj solidarecon inter niaj junaj kaj maljunaj movadanoj. Tial mi scivolis, ĉu mi trovus ĉe IJK grandan kontraston — akran dividemon aŭ ribelan etoson. Krome, mi aŭdis multajn famojn pri diferencoj inter la movado en Usono kaj en Eŭropo, kiujn mi volis konstati; kaj kiel kondiĉo de mia financa subteno, mi devus volonte deĵori ĉe la kongreso. Mi do pretis rigardi la aferon kiel laborvojaĝon.

Ne necesis multa tempo tie antaŭ ol mi rimarkis, ke mi nek povis, nek volis, plu trakti ĝin kiel simplan laborvojaĝon. La kongresantoj ne venis por konferenci; ili venis por festi, por pasigi agrablan tempon kiel junuloj. Tiam mi ekkonsciis mian plej gravan taskon: lerni kiel junulumi.

---

La kongresejo estis ĉarma feriejo nomita *Energetikas*, lokita tuj apud la Balta Maro. Estis multaj kabanaj maksimume po tri litoj — sufiĉe por ĉiuj kongresantoj, kvankam kelkaj elektis la plej proksiman hotelon, *Banga*.

Esperantlingvaj afiŝoj troviĝis ĉie, inkluzive varman “BONVENON” ĉe la enirejo.

Estis ankaŭ manĝotendo kaj kelkaj konstruaĵoj, kie dum tago okazis la programeroj, kaj dum nokto estis dediĉitaj spacoj: la diskejo en la Ruĝa Salono, la amuzejo kun trinkejo en la Verda Salono, kaj la ‘gufujo’ en la Flava Salono. Multaj usonanoj jam konas gufujon kiel liberan spacon ĉe esperantaj kongresoj por amuziĝi, sed delonge mi aŭdis famojn, ke mi ankoraŭ ne spertis ‘veran’ gufujon — ke ili mankas en Usono. Unu el miaj taskoj estis studi la gufujon tie por konstati.

## Gufujo

Ĝi estis en relative malgranda ĉambro. Ĉiu tablo havis kandelon, sed ne ĉiam brulantan. Homoj sidis ĉe la tabloj kaj babilis, foje trankvile, foje ne. Kelkofte ili prenis el monto de tabulludoj, kiuj amasiĝis en tiu salono. Dolĉaj biskvitoj estis vendataj kun preskaŭ dudek specoj de teo — nepre nenio ebria. Mi mallonge intervjuis Vlasta PIŠŤÍKOVÁ, la gufujestron; laŭ ŝi, la lumoj kutime estus malpli brilaj, aŭ estus senluma angulo, sed en tiu konstruaĵo ne eblis ŝalti kelkajn kaj malŝalti aliajn.

Ankaŭ Birke DOCKHORN komplezis dividi kun mi siajn spertojn pri gufujoj. Ŝi klarigis al mi, ke ne ĉiu gufujo estas sama — tio dependas de la loko kaj de la gufujestro. Kelkaj postulas pli trankvilan etoson, kelkaj ne; kelkaj toleras tabulludojn, kelkaj ne. Kelkaj fajfas pri kandeloj, kelkaj dependas de ilia lumo. Per nia interparolo mi konstatis tri aferojn:

- gufujo bezonas estron, varman teon kaj neniun alkoholon;
- gufujoj ekaperis kiel alternativo — nepre la plej milda — al la aliaj spacoj, ĉu drinkejo ĉu diskejo ĉu alia;
- kongresejo ankoraŭ meritas ĉiujn ĉi spacojn.

En Usono estas kutime nur unu spaco, kiu devas esti kaj gufujo, kaj drinkejo, kaj alio ajn, sed ne eblas servi ĉiujn celojn samloke. Birke tamen konsentis, ke eble usonaj kongresoj estas ne sufiĉe grandaj por apartaj ĉambroj. Tiuokaze mi eĥas la proponon nomi nian usonecan noktejon “aglujo”.

La aliaj gufoj interesiĝis pri niaj aglujoj. En la ĉi-jara Landa Kongreso, ĝi estis ege laŭta, ebria, senestra, kaj plena je malpli decaj tabulludoj, ekzemple *Kartoj kontraŭ Esperantujo*. Ili diris, ke tia spaco ja ekzistu por tiuj, kiuj

volas ĝin, sed ke ĝi nepre ne estu nomata “gufujo”. Sed pli surprize al mi, multaj ili asertis, ke gufujoj apartenas al la junulara kulturo, ne al la pli vasta ‘esperanta’ kulturo. Laŭ ili, kaj IJK kaj la Junulara E-Semajno (JES), interalie, havas ĉi tiajn gufujojn; E-USA evidente ne, kaj eĉ la montreala Universala Kongreso nomis “gufujo” publikan drinkejon apud la kongresejo mem.

## Trinkejo

Publikan drinkejon mi imagis ĉiam, kiam oni parolis pri trinkejo ĉe kongreso. Tiel estis mia sperto. Mi ne supozis, ke kutime ankaŭ tiu loko apartenas al la kongreso mem, kaj bezonas *servistojn*. Kelkajn noktojn do, tio estis alia tasko mia, kaj unu tre plaĉa. Amuza cirkonstanco, por vidi eŭron unuafoje! Mi riproĉis min, ke mi ne familiariĝis pri la valuto antaŭ mia deĵoro; dankinde miaj unuaj klientoj estis paciencaj dum mi kalkulis la restmonon. Kompare al usona mono, eĉ la moneroj klare esprimas sian valoron per grandaj ciferoj, kaj la biletoj havas apartajn kolorojn — ne necesis multa tempo por lertiĝi!

La Verda Salono estis la plej granda, do tie okazis grupaj tabulludoj kaj ankaŭ karaokeo kelkfoje. La dancado de la aŭskultantoj tiel skuis la vendotablon, ke la ladskatoloj trafis la plankon, kiam mi ne tenis ilin. Bonŝance, neniu venis mendi trinkaĵon dum la kantoj plej ekscitaj!

## Koverta Poŝto

En tiu sama salono troviĝis unu el miaj plej ŝatataj eroj de la kongreso: la Koverta Poŝto. Oni rajtis preni kaj garni propran koverton per la nomo kaj aliaj detaloj laŭ sia volo. Landoj, lingvoj, ŝatokupoj — ĉiuj manifestitaj per desegnaĵoj, kaligrafio, eĉ stampoj. Al la muro oni fiksas sian koverton, en kiun aliaj rajtis meti por tiu persono leterojn kaj etajn aferojn. Foje mi eĉ ricevis kondomon — kvazaŭ mi havus la okazon uzi ĝin!

La Poŝto tuj kaptis mian intereson. Efektive neniun kongresanton mi renkontis antaŭe, do mi ŝatis la oportunun tiel konatiĝi. Mi faris demandojn el la detaloj



sur ies kovertoj, kaj rilatis al tiuj temoj kiel eble. Pli poste en la semajno, mi skribis al iuj por laŭdi iliajn prezentojn aŭ spektaklojn. En unu okazo, mi vidis pokemonon sur koverto, do mi menciis mian plej ŝatatan, kaj ricevis kiel respondon belan desegnaĵon de ĝi! En alia okazo, iu petis mian helpon traduki mesaĝon tokiponan; el tiaj korespondoj rezultis improvizita tokipono-kurso poste en la semajno.

Iam, mi decidis skribi al plej da homoj kiel eble. Mi ne volis, ke la poŝtoservo estu flanklasita, nek ke oni sentu sin ignorita aŭ nevidebla sen ajna kontakto, do en mia menso, mi prenis tion kiel alian taskon por helpi al la kongreso. Post iu punkto mi ĉesis nombri miajn skribojn, sed mi ricevis enfine 34 leterojn, plimulte kiel respondojn. Bedaŭrinde mi trafis eĉ ne trionon de la pli ol cent kovertantoj, ĉar mi ne volis maltrafi la kongreson mem; sed la korespondoj, kiujn mi ja povis fari, estas tre karaj al mi.

Aliaj rimarkis al mi, ke la Koverta Poŝto estas kongresa tradicio, kiu tamen malaperis dum iom da tempo, renovigita antaŭ nelonge. Mi forte esperas, ke ĝi fariĝos konstanto!

## Programo

Alia devigo al ni, gajnintoj de financa subteno, estis prepari programeron. Mi simple prezentis prelegon pri mia fako — datumsekurizado — ĉar laŭ mi, la monda junularo devas scii, kiel eviti ciberminacojn kaj retajn trompojn. Malsaĝe, mi pasigis preskaŭ plenan tagon dum la kongreso finlaborante mian prezentaĵon, ĉar mi timis esti malpreta; sume mi prilaboris ĝin pli ol 20 horojn, kaj ne povis montri la lastan trionon de ĝi pro elĉerpo de la 90-minuta periodo. Nun mi scias pli bone por la venonta fojo!

La kongresa programo estis tre bunta kaj riĉa. Ĉefe interesis min la aferoj proponitaj de la aliaj gajnintoj, kiuj venis ĉiuj de apartaj kontinentoj. Santiago ESMERAL el Argentino instruis dancokurson — eĉ la bazaj movoj estas malpli facilaj ol ili ŝajnas! Espoir KASATI rakontis la historion de la pigmeoj — unu afrika indiĝenaro — kaj ilian rilaton kun sia lando, DR Kongo, ĝis la nuntempo. Plej ekscitis min tamen la babilrondo kun ĉinaj esperantistoj, prezentita de Ŝujano Hou; ses kongresantoj ĉeestis, sed estis pli ol 20 virtualaj partoprenantoj en Ĉinujo! Mi miris, kiel kompareblaj estis iliaj spertoj al tiuj de mi kaj aliaj usonanoj; unu komencis lerni Esperanton en 2020 pro enuo de la pandemio, same kiel mi, kaj iliaj kunsidoj ŝajnas multe pli similaj al la niaj ol al la eŭropaj. Post tiu babilrondo mi ricevis la impreson, ke kaj Ĉinujo kaj Usono suferas la saman mankon de konekto al la internacia movado.

Aparte imponis min la prelego de Ivo MIESEN pri la Volontula Projekto Pakrac, kiun li partoprenis en 1994. La temo de la kongreso estis ‘packonstruado’, kion miaaĝaj kongresantoj ofte forgesis aŭ defiis per pesimisma humuro; sed lia rakonto montris, kiel paco povas esti konstruita eĉ en tiel malesperaj cirkonstancoj, kiel en la Jugoslavaj Militoj. Tiam, internaciaj volontuloj venis por flegi, eduki kaj rekonstrui en Pakrac, urbo ruinigita de ambiciaj militistoj, kiuj celis dividon inter siaj popoloj. Ĉeestanto demandis al Ivo, ĉu milito tie estis instigita aŭ aranĝita de ekstera forto, “ekzemple, Usono” ... Eĉ usonanoj povas esti tiel kritikemaj pri la monda influo de sia registaro; sed rekte aŭdi, kiel la mondo parolas pri ĝi, estas sobrige. (Ivo opiniis, ke la milito estis tro ĥaosa por esti aranĝita de ekstera forto.)

Ankaŭ en la libroaŭkcio mia nacieco iom embarasis min. Mi vizitis hazarde dum la mezo, kiam aperis ekzemplero de *Sekretaj sonetoj* — libro, per kiu mi nepre lertigu min, se mi iam ajn utiligus tiun kondomon el mia koverta poŝtujo. Post du aŭ tri ofertoj, mi gajnis kontraŭ dek eŭroj. Virino apud mi ŝercis, “Ili ne lasu usonanojn partopreni en aŭkcio — ili simple aĉetos ĉion, kion ili volas!”

Malgraŭ tio, mi celis bone reprezenti Esperanto-USA, por kio mi havis oportunon dum la Movada Foiro, kiu kombiniĝis kun la Trinkomanĝa Nokto. Mi venis kun dudek ekzempleroj de *Usona Esperantisto* № 2024:2 kaj kelkdek glumarkoj faritaj de mia patrino, kaj ĉion fordonis. Bedaŭrinde do mankis al mi tempo por trinki aŭ manĝi de ĉiu lando, sed mi plej ĝuis la nederlandajn siropvaflojn (*stroopwafels*) kaj la ĉinan laĉion (*latiao/辣条*), kiun Ŝujano priskribis kiel spican manĝeton, faritan ĉefe el tritika faruno aŭ amelo. En la manĝotendo ni vidis la britan standardon en ĉies manoj, ĉar estis malsufiĉe da tasoj, sed la britoj

kunportis siajn proprajn; ni bone ridis pro tio, ke Britujo “koloniis” nian parton de Esperantujo.



## Ekskursoj

Tiel proksime al la Balta Maro, la plimulto de la ekskursoj temis pri akvo, kaj mi ne scipovas naĝi. Sed unu tuj kaptis mian atenton — la Muzeo pri la Malvarma Milito. El ĉiuj miaj aventuroj ĉi-jare, la viziton al tiu muzeo plej enviis miaj parencoj; usonanoj ankoraŭ havas kuriozan intereson, kvazaŭ nostalgion, pri la Sovet-Unio kaj ĝia etoso.

La vorto ‘muzeo’ pensigis min pri halo de konservitaĵoj. Mi tute ne antaŭvidis, ke ĝi fakte estas forlasita nuklea misilbazo, komplementita de armiloj, propagandaj kaj vaksfiguroj de sovetaj oficiroj, kiuj kompletigis por ni la scenojn siatempajn. Unu demandis min, ĉu la propagandafiŝoj pensigas min, ke Usono estas la ‘malbonuloj’; mi nur povis ridi. Surprize, la ĉiĉeronino prezentis ĉion en la angla, kiun ne scipovis kelkaj ni, inkluzive mia samkabanano, do mi havis la oportunon interpreti por li. Estis juste, ĉar li devis toleri mian ronkadon tutsemajne!

Poste, ni apartiĝis en du grupojn — unu por boatado en lago, kaj unu por esplori la urbeton Plateliai. Mi iris kun la dua por eviti akvon, kvankam mi ne tute sukcesis, ĉar komencis plui. Kun la kongresorganizanto Severija BANAITYĖ kiel interpretanto, ni vizitis ĉefbienon de la urbo, kapelon, kaj muzeon de karnavalmaskoj. Tie, virino instruis al ni tri karnavalajn dancojn, inkluzive unu, kiu finiĝas per ventro-karambolo kun dancpartnero. Kiel la plej peza en la grupo, mi timis forsendi aliulon. Estis ankaŭ balancilo en la ĉambro, fiksita al la plafono, kaj ĉiuj petis vidi min sidi sur ĝi — mi rifuzis, ĉar mi ne volis rakonti en ĉi tiu artikolo, kiel mi difektis parton de muzeo pro tropezo!

## The Language Corner

with Lee Miller

### Participles in Esperanto: The Basics

Estis privilegio kaj honoro pasigi mian unuan vojaĝon ekster Nord-Ameriko kun esperantistoj. Mi jam supozis, ke tio estus nur la unua el multaj, sed mi ne atendis, kia rava sperto estus mia unua IJK. Jes — mia unua, ĉar mi nepre iros al pli. Ĝi ŝanĝis la kalkulon en mia menso; mi esperis konservi sufiĉan monon simple por unu esperanta evento ĉiujare, eĉ enlande, sed nun, IJK estas prioritato.

Laŭ TEJO, mi estos ‘junulo’ naŭ jarojn plu, kvankam oni ne devas aĝi malpli ol 35 jarojn por partopreni IJK. Vere plaĉis al mi la pli aĝaj kongresantoj; ili pruvis bone, ke juneco estas en la menso. Kaj tio estas mia plej grava konstato post ĉio; mi pasigis miajn jarojn kiel esperantisto ĝis nun sen juneco en mia kapo. Mi estas emocie singarda kaj hontema. La litova IJK lasis al mi gustumi inter samideanoj tion, kio delonge mankis al mi. Mi dancis unufoje en diskejo; mi “ne scipovas danci”, sed paŝon post paŝo, mi akceptis ies kuraĝigon. Mi rakontis antaŭ granda spektantaro dum komedio-nokto. Mi *preskaŭ* kantis dum karaokeo! Kaj mi scias, ke restas tempo al mi por junulumi plu.

Denove mi dankas kaj TEJO kaj E-USA pro tio, ke ili finance ebligis al mi ĉi tiun mirindan okazon. Mi plenkore gratulas kaj dankas la organizantojn de IJK 2024 pro ilia esenca laboro. Laŭfame, IJK en Litovujo komenciĝis kiel memeo, sed nun Litovujo, kaj miaj novaj amikoj de tie, okupos ĉiam specialan parton de mia koro.

A “participle” in Esperanto is a word that’s formed by adding one of these endings to a verb:

-*ant-*, -*int-*, -*ont-* (active forms)

-*at-*, -*it-*, -*ot-* (passive forms)

Participles are used constantly in Esperanto. The name “Esperanto” itself is a participle, formed from the verb “*esperi*”, and means “a person who is hoping”.

Participles can end in -*o*, -*a*, or -*e*. There are some simple rules that determine the meaning of the resulting word.

A participle ending in -*o* is a person:

kuranto = a person who is running

dungito = a person who has been hired, an employee.

A participle ending in -*a* is an adjective:

La kuranta knabo falis =  
The running boy fell.

La dungita kuiristo estas spertulo =  
The hired cook is an expert.

A participle ending in -*e* says something about the subject (only the subject) of the sentence when something else occurs:

Kurante, la knabo falis =  
While running, the boy fell.

Dungite, mi transloĝiĝis al Tanzanio  
= Having been hired, I moved to Tanzania.

## La promocio

rakonte • Timothy BORONCZYK

Alvokita al la oficejo de sia estro, Tajlero cerbumis pri la kialo. Ĉu li ofendis iun? Ĉu iu malŝatas lian laboron? Li sentis honton kaj timon — paron, kiun li ne sentis samtempe de post kiam la lerneja rektoro alvokis lin, pugnobatintan samklasanon, kiu parolis Idon. Fakte, tio okazis antaŭ tiom longe, ke li ne plu memoris la nomon de tiu juna idisto.

Tajlero hezite eniris la luksan oficejon. Sed anstataŭ koleraj krioj, la estro salutis lin per varma rideto. “Vi ricevas promocion al la posteno Direktoro pri Financo,” deklaris la estro, prezentante leteron al Tajlero. “Gratulon! Vi meritas tion.”

*Kia atingo!* pensis Tajlero. *Ĉu ĉi tio vere okazas?* Li pinĉis sin por certigi, ke ne temis pri sonĝo.

Post iom da interdiskuto, la telefono sonoris. “Pardonu min,” petis la estro, rigardante ĝin. Tajlero kapjesis kaj turnis sin al la pordo por foriri.

Irante al la pordo, Tajlero neintence aŭdis la komencon de la konversacio inter sia estro kaj ... iu pli potenca.

“Yes, *sioro* ...” flustris ide la estro en la parolilon. “*Me koncias pri to ... Me komprenas ... La firmo bankrotas.*”

Timo denove atakis Tajleron. Sed li ne volis ŝajni, kvazaŭ li aŭdis ion, do li simple daŭrigis sian eliron.

“*Omno esas aranĝita, sioro. Me jus promociis Taylero, tale ke nur il esez blamita.*”

# Pri la Universala Kongreso en Tanzanio

kongresaj raportoj • Brandon SOWERS

Hakuna Matata - Neniu Problemo. Jen la devizo sur ĉemizo, kiun mi ricevis, fine de la Universala Kongreso en Aruŝo. Tiu frazo, popularigita per *The Lion King* (“La leona reĝo”), efektive estas ofta diraĵo en la landoj, kie oni parolas la svahilan. Kaj oni diras al mi, ke kiam mi estis infano en Kenjo, ankaŭ mi diris tion, jarojn antaŭ la kanto de Timon kaj Pumba.

Kiam mi unuafoje aŭdis, ke UEA planis organizi Universalan Kongreson (UK) en Tanzanio, mia intereso tuj kaptiĝis. Tio estus la unua UK okazonta en Afriko, jam en si mem interesa; ĝi ankaŭ por mi estus iusence reveno al personaj radikoj, pro tio ke mi loĝis kiel infano en la najbara (kaj kulture tre simila) lando Kenjo, kvankam mi neniam havis okazon reveni al Afriko kiel plenkreskulo, malgraŭ miaj intereso kaj volo. Mi sciis, ke mi tre ŝatus iri, partopreni tiun historian kongreson, kaj plenumi ankaŭ tiun personan deziron.

Krom tio, mi ankaŭ ja volis, ke niaj lando kaj asocio estu bone reprezentataj ĉe la Universala Kongreso, kaj ŝajnis, ke ne multaj iros de Usono, do mi des pli prioritatis la partoprenon. (Tamen, mi ĝoje konstatis, ke Usono estis unu el la landoj kun la plej altaj kvantoj da aliĝintoj, kaj efektive nemal multe da partoprenantoj — pli ol dek, laŭ mia memoro.)

Mi jam partoprenis kelkajn UK-ojn: tiun de Montrealo en 2022, de Kopenhago en 2011, kaj de Kubo en 2010. Eble, se la ĉi-jara okazus en alia loko, mi ne tiom prioritatis ĝin; sed mi sciis, ke estos historia okazaĵo, kaj ke estas neantaŭvideble, kiam denove okazos granda Esperanto-kongreso en Afriko. Mi ankaŭ sciis, ke tio parte dependus de tio, kiom da homoj partoprenus, kaj ke mia eventuala partopreno influus tiujn sekvojn.

Sed restis demando al mi: la Universala Kongreso okazos en Afriko, jes, sed kiom forta estas la afrika movado? Kiom da afrikaj samideanoj partoprenos, kaj kian lingvonivelon ili havos? Mi iomete timis, ke mi iros al kongreso en Afriko kiun partoprenos ĉefe eŭropanoj, kun kelkaj samideanoj el Orienta Azio kaj Ameriko.

Feliĉe, ne tia estis la situacio. Tio evidentiĝis al mi tre rapide, dum la Movada Foiro, kiam mi deĵoris ĉe la tablo de Esperanto-USA, kaj montris nian bultenon, nian filmfestivalon, kaj parolis kun samideanoj pri nia asocio. La plejmulto de la homoj, kiujn mi vidis kaj renkontis, estis afrikanoj, ĉefe el Tanzanio kaj du najbaraj landoj, Burundo kaj Demokrata Respubliko de Kongo. La lingvonivelo estis tre varia — tio signifas, ke estis iuj, kiuj evidente estis

komencantoj aŭ progresantoj, kaj aliaj, kiuj flue parolis kaj pretis konversacii. Nu, ĝuste kiel mi atendus ĉe multaj aliaj landaj movadoj, inkluzive de la nia en Usono. Sed la simpla kvanto de homoj, kiuj partoprenis el tiuj landoj, kaj kiuj evidente ne hieraŭ eklernis Esperanton, montras, ke estas seriozaj laborantoj por la afero en tiuj landoj.

Tamen, mi devas mencii, ke la ekonomia nivelo kaj kulturaj atendoj de la afrikaj samideanoj, kaj tiuj de Eŭropo, Ameriko, kaj Orienta Azio estis tre malsamaj, kaj tio havis plurajn sekvojn. (Indas memori, ke Burundo, ekzemple, estas konsiderata la dua plej malriĉa lando en la mondo.) Pri iuj flankoj, oni bone organizis, aŭ almenaŭ provis. Ekzemple, por multaj afrikaj samideanoj, estus tre malfacile partopreni la kongreson kun eĉ minimumaj elspez-atendoj. Pagi dek dolarojn por la tagmanĝo estas en ordo, se vi venas de lando, kie eĉ malbone pagata laboristo enspezu tion hore; sed se vi venas de lando, kie averaĝe pagata laboristo enspezas 80 \$ monate, estas alia afero. Laŭ mia kompreno, UEA helpis al la lokaj movadoj subvencii la partoprenantojn, ekzemple per taga poŝmono kaj pagitaj hoteloj. Sed eĉ tiam, estis multaj momentoj, kiam malmultis intermiksado inter la ‘lokaj’ kaj la ‘fremdaj’ esperantistoj. Tio reliefiĝis al mi, ke eĉ se ni esperas, ke nia lingvo egaligas ĉiujn, kaj ke ni estas simple ‘homoj kun homoj’, tamen estas materiaj limoj al la unuiga povo de nia lingvo, kiujn ni ankaŭ devas alfronti, se ni ne volas ignori ilin. (Kurioze, kiam mi pensas pri la UK kaj IJK en Kubo en 2010, mi ne memoras, ke tiu fenomeno estis same forta. Povas esti, ke mi malbone memoras, aŭ ne bone perceptis tiam; aŭ povas esti, ke pro la subteno de la registaro por la movado, aferoj estis iom aliaj.)

Mi ja multe amuziĝis dum la kongreso kaj la diversaj ekskursoj. Mi helpis pri antuaŭkongresa tritaga ekskurso al tri naciaj parkoj, interpretante inter la gvidisto kaj la aliaj esperantistoj. Dume, mi lernis multajn vortojn por bestoj, kiujn mi ne konis antaŭe, kiel ‘verukapro’. Mi interpretis ankaŭ dum unutaga ekskurso de marŝado en Monto Kilimanĝaro, kio estis unu el miaj revoj pri la vojaĝo, kaj ja estis tre agrabla sperto. (Por marŝi ĝis la pinto, oni bezonas 7-10 tagojn, kaj milojn da dolaroj, kiujn mi bedaŭrinde nek-nek disponis ĉi-foje.)

Krom la amuzado, mi ankaŭ prioritatis la laborajn flankojn de la kongreso. Miaj celoj estis: bone reprezenti nian asocion ene de la internacia movado; kompreni, kiaj estas la nunaj dinamiko kaj prioritatoj tie; kiel ni povos kontribui; kaj kiel ni povos antaŭenigi niajn prioritatojn. Efektive, la usona movado estis iom izoliĝema dum la

lastaj jaroj — sed kelkaj korektoj jam ruliĝas. Ekzemple, ni rajtas havi reprezentanton en la 'komitato' de UEA (ĝia plej alta decidpova organo), kiel ĉiu alia landa asocio. Efektive, laŭ nia statuto, estas la prezidanto, kiu devas reprezenti nian asocion, sed tio ne vere okazis dum iom da tempo, kaj ni ne havis propran voĉon en la internacia movado. Oni renovigos la komitaton por tri-jara deĵoro venontjare en Brno, do mi rajtis nur iri al la komitatkunsido kiel 'observanto', tamen mi ja partoprenis plurajn 'forumajn' kunvenojn, kie eblis paroli libere, kaj mi intervenis dum la ĉefa kunsido pri unu temo kiu gravas por ni — la oficejo ĉe la Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko — per kuraĝigo al la komitato subteni ĝin per la buĝeto. Tio estis bona preparo, por iom 'koni la terenon' kaj povi plene partopreni dum la venonta UK.

Ekster la komitataĵoj, ankaŭ tre interesa estis la kunveno de la 'Amerika Komisiono', kiun partoprenis ĉefe reprezentantoj de Kanado, Usono kaj Brazilo. Tiu regiona kunlaboro estas strategie grava por ni, kaj la kolegoj de Kanado kaj Brazilo montris seriozecon. Oni parolis pri diversaj planoj subteni agadon en aliaj landoj kun malpli fortaj movadoj. Unu interesa ideo, kiun oni diskutis dum tiu kunveno, estis ke Usono povus gastigi la venontan 'Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto', verŝajne en 2026. La komisiono poste sendis al ni oficialan inviton pri tio — afero, kiun la estraro konsideros dum la venontaj monatoj. (Se via loka grupo interesiĝas pri organizado de tia kongreso, bonvole kontaktu nin!)

Entute, estis kongreso plena je sukcesoj kaj defioj, laboro kaj amuzo. Mi opinias, ke estis grave okazigi kongreson en Afriko, malgraŭ ĉiuj malgraŭoj. Mi ĝojas, ke mi persone sukcesis ĝin partopreni. Kaj mi kredas, ke ni bone reprezentis nin, kaj montris al la internacia movado, ke ni pretas ĝin plene partopreni.



## Kriminala asocio

vojaĝe tra Usono • Cirilo SANZ, ROZ' SANZ

Dum nia unua mondvojaĝo, post forlasi Aŭstralion, ni alvenis en Usonon, alteriĝantaj en Sanfrancisco. Tiam, ni biciklis suden laŭ la marbordo ĝis Sandiego antaŭ ol reveni al Meksiko tra Tijuana. Kutime ni starigis la tendon en arbaroj aŭ aliaj neantaŭplanitaj lokoj. Sed en Kalifornio, jen je unu flanko la maro, jen aliflanke la montoj, kaj jen nia vojo inter la du. Do, kiam ni ekvidis tendumejon, ni tuj kaptis la okazon.

Iun matenon en nia tendumejo, mi metis mian paketon de biskvitoj sur la malantaŭon de mia biciklo. Tiam, ni vidis birdon veni, malfermi la paketon kaj ŝteli biskviton antaŭ ol forflugi al arbo iom for. Nekredeble! Li tute ne timis tiel proksimiĝi al ni.

Kelkajn minutojn poste, li revenis kaj denove ŝtelis, ĉi-foje de nia kuko! Li forflugis portante ĝin en la beko. Mi pensis, ke mi faru filmeton pri tio. Mi iris preni la fotilon — kaj kompreneble la birdo ne revenis. Mi atendis — nenio! Mi senkuraĝiĝis kaj iris al la biciklo.

Tiam mi ekkomprenis, kial ĝi ne revenis. Ne plu estis biskvitoj en la pakaĵo; la birdo ŝtelis ĉiujn antaŭ ol mi rimarkis, kion li faris. Mi prenis iom da kuko de Cirilo, metis ĝin en la pakaĵon sur la biciklo, kaj lasis la reston de la pakaĵo sur la tero apud la tendo por tenti la birdon. Post kelkaj minutoj la birdo revenis, kaj ĉi-foje mi sukcesis foti ĝin plurfoje. Mi estas tiel feliĉa ...

Sed, imagu! Dume, Cirilo fotis sciuron, kiu ŝtelis la restaĵon de la kuko metita proksime de la tendo. Sendube ĉi tiu asocio de krimuloj, birdo-sciuro, ŝtelis nian tutan matenmanĝon, sed ni nenion bedaŭris!

Adaptita de origine franclingva anekdoto, eldonita en ilia libro: <horizonto.net>



# Esperanto kaj la franca

historie • Joshua HOLZER

Lerni novan lingvon, eĉ ‘simplan’ lingvon kiel Esperanto, estas malfacile.

En la komenco, estas facile progresi rapide. Sed ju pli oni lernas, des pli la progreso ŝajnas malrapidiĝi. Fine vi atingas etapon, ĉe kia punkto vi ne sentas, ke vi entute progresas.

Atinginte tian etapon, foje mi trovas utile fari paŝon malantaŭen kaj koncentri mian atenton aliloke dum iom da tempo; alie mi riskas perdi motiviĝon entute. Mi sciis, ke mi vizitos Francujon ĉi-somere, do mi decidis lerni iom de la franca.

Esperanto kaj la franca havas interesan kaj tumultan historion. En 1905, Francujo gastigis la unuan Universalan Kongreson. Ĝi poste gastigis en 1914, 1932, 1950, 1957, 1998, kaj 2015. Entute, Francujo gastigis pli da Universalaj Kongresoj ol iu ajn alia lando.<sup>1</sup>

En 1921, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) estis fondita, kaj hodiaŭ ĝia sidejo estas en Parizo, Francujo. SAT estas eble plej konata kiel eldonanto de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV).

Kvankam Esperanto delonge estas populara en Francujo, foje Francujo estis dorno en la flanko de Esperanto.

Ekzemple, post la unua mondmilito, la Ligo de Nacioj – la antaŭulo de la Unuiĝintaj Nacioj – estis fondita en espero malhelpi estontan konflikton.<sup>2</sup> Baldaŭ poste, la irana delegito al la Ligo de Nacioj proponis,<sup>3</sup> ke Esperanto estu adoptita kiel lingvo de internaciaj rilatoj.

Tamen, ĉi tiun proponon vetois la franca delegito,<sup>4</sup> Gabriel Hanotaux, kiu timis, ke la franca lingvo perdos sian prestiĝon en diplomatio.

En 1922, la franca registaro faris paŝon plu kaj malpermesis la instruadon de Esperanto en ĉiuj francaj universitatoj,<sup>5</sup> ĉar ĝi supozeble estis ilo por disvastigi komunisman propagandon.

Malgraŭ tio, hodiaŭ Francujo havas pli da membroj en la Universala Esperanto-Asocio ol iu ajn alia lando, kio estas tre impona pro ĝia loĝantaro. Francujo, lando de 68 milionoj da homoj, havas 395 membrojn. Kompare, Germanujo, kiu havas 84 milionoj da homoj, havas 387 membrojn, kaj Usono, kiu havas 333 milionojn da homoj, havas 243 membrojn.

Kiam mi komencis studi la francan, surprizis min rekoni tion da vortoj. Zamenhof scipovis la francan, kaj interalie

pro tio, Esperanto havas multajn vortojn de franca origino.<sup>6</sup> Studi la francan helpis min kompreni, kiel iuj vortoj eniris Esperanton. Ekzemple, la vorto *kelka* en Esperanto estas derivita de la vorto *quelque* en la franca. La du vortoj estas skribitaj tute malsame, sed ili sonas same, kiam ili estas prononcitaj.

Franca literumo estas fifame malfacila, sed esperanta literumo estas tre simpla. Simile francaj verboj estas tre malfacilaj, dum verboj estas multe pli facilaj en Esperanto. Dum mia scio pri la franca kreskis, tiel ankaŭ mia aprezo de Esperanto.

Post mia vojaĝo, mi povis reveni al miaj Esperanto-studioj refreŝigita, kaj kun entuziasmo repreni la aferon de kie mi ĉesis.

Se interesas vin ripozi mallonge de Esperanto, mi afiŝis la fulmkartaron, kiun mi muntis por studi la francan rete. Vi povas elŭti ĝin ĉe Anki.<sup>7</sup>

Post kiam vi frustrigis pri la franca, vi povos ekuzi mian esperantan fulmkartaron. Vi povas elŭti ĝin ĉe Anki,<sup>8</sup> kaj legi pri ĝi en pasintjara numero de *Usona Esperantisto*.<sup>9</sup>

Se vi estas kiel mi, preni mallongan paŭzon por studi la francan donos al vi pli grandan aprezon por la brileco de Esperanto.

- 
1. <[uea.org/kongresoj/listo](http://uea.org/kongresoj/listo)>
  2. <[youtube.com/watch?v=tul0iUZ5F50](https://www.youtube.com/watch?v=tul0iUZ5F50)>
  3. <[web.archive.org/web/20220731041415/http://en.umz.ac.ir/index.aspx?siteid=122&&siteid=122&pageid=13816&newsview=30091](http://web.archive.org/web/20220731041415/http://en.umz.ac.ir/index.aspx?siteid=122&&siteid=122&pageid=13816&newsview=30091)>
  4. <[loc.gov/resource/gdcwdl.wdl\\_11591/?r=0.317,0.345,0.547,0.276,0](https://www.loc.gov/resource/gdcwdl.wdl_11591/?r=0.317,0.345,0.547,0.276,0)>
  5. <[web.archive.org/web/20220727013517/https://www.gastearsivi.com/en/gazete/evening\\_star/1922-07-16/25](https://www.gastearsivi.com/en/gazete/evening_star/1922-07-16/25)>
  6. <[libro.ee/file.php?id=1269](http://libro.ee/file.php?id=1269)>
  7. <[ankiweb.net/shared/info/529599016](http://ankiweb.net/shared/info/529599016)>
  8. <[ankiweb.net/shared/info/1542983630](http://ankiweb.net/shared/info/1542983630)>
  9. <[bulteno.esperanto-usa.org/a/2023/05/instruado/](http://bulteno.esperanto-usa.org/a/2023/05/instruado/)>

# Kvardek du tokiponuloj en Berlino festas per esperanta kanto

## Raporto de tokipona korespondanto Ret SAMYS

kongresaj raportoj • Ret SAMYS, Sonja LANG

La redakcio aparte feliĉas ricevi korespondaĵon, originale verkitan de Ret SAMYS por la tokipona periodaĵo *lipu tempo*. Sonja Lang adaptis por *Usona Esperantisto* la artikolon en maniero, kiu cele konservis multajn tokiponecajn erojn de la teksto. Ni feliĉas, ke legantoj, kiuj ankoraŭ ne scipovas tokiponon, tiel havos okazon gustumi la lingvon.



### Ĉu la partoprenintoj en Berlino multis?

Jes, ili estis pli-malpli 42!

En la nova jaro ni volis reinviti la komunumon en Eŭropo. Ĉar la kunveno estis la tria, la grupo denove grandis kaj tiom amuziĝis en la ĉefcentro de Berlino en Germanujo.

### Eventa komenco

Kiam la plimulto alvenis, unu eraro gravis: multaj aparatoj de komerca laboro paneis, do multaj homoj ne povis uzi veturilojn en la aero. Tri homoj vojaĝis de foraj landoj. Unu homo alvenis en alia tempo. Alia homo alvenis alimaniere. La lasta homo alvenis nur ĉe la fino. Bedaŭrinde! Sed gravas, ke tiu venis kaj estis kun ni. Mi amis la partoprenantojn.

Sed kion ni faris en tiu granda grupo? Ni multege babilis, amuziĝis kaj sentis nin kiel komunumo. Komence ni volis promeni en la arbaro. Ni interkonatiĝis, ŝercis kaj observis la plantojn. Poste ni volis manĝi grupe. Kiam ni iris al restoracio, mi parolis pri la teamo de la gazeto *lipu tempo* kaj pri ĝia metodo. Multaj homoj ekhavis ankaŭ paperan ekzempleron. Ĝi plaĉis al la okulo kaj en la mano.

### Varma tempo de promenado

Tiu tago estis longa tempo kune. Preskaŭ la tuto de la grupo ĉeestis. Ni volis lerni pri la urbo, ĝia historio kaj

arĥitekturo. Feliĉe dum karaj Tamalu kaj Simiman ĉiĉeronis en la urbocentro, ni aŭskultis ilian prelegon kaj lernis. Unu afero aĉigis la amuzadon: la suno estis forta kaj varmigis la urbon kaj nin. Kaj ni longe promenis. Tio forigis nian energion. Uf!

Ni volis esti for de la suno. Ni iris al amuza parko. Sablo, amuziloj kaj kurantaj infanoj enestis, sed grave estis konvenaj mebloj. Ni povis ripozigi niajn korpojn sur ili. Mi havis koloran bastoneton [*kreton*], do la grupo ekpovis meti kolorajn desegnaĵojn kaj skribaĵojn sur la tera surfaco. Du infanoj kaj unu plenaĝulo ekdemandis pri la skribaĵoj. Iu legis nian skribadon kaj mesaĝojn al ili. Ho, kia eltrovo!

### Varma tempo de ripozado

La varmo persistis kaj egis. Neniu en la grupo volis foriri. Ni restis en la parko en la ombro de la plantoj. Estis sufiĉe da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Tepo (Teodoro), Kasape kaj mi invitis la grupon apud ni. La grupo estis unu granda rondo, do ĉiuj povis vidi nin tri. Tiel ni povis instrui la tokiponan signolingvon, kiu nomiĝas Lukapono.

Kio estas Lukapono? Kiam multaj homoj komunikas, ili uzas buŝajn sonojn. Sed ne ĉiuj povas bone aŭdi aŭ voĉi. Aliaj komunikmanieroj ja ekzistas. Sen uzi sonon oni povas komuniki per la manoj, korpo kaj movoj. Dum la plimulto de tiu renkontiĝo, ni komunikis per buŝaj sonoj. Sed dum



la instrua sesio, la grupo lernis la manieron komuniki silente.

Feliĉege la instruisto Lakuse disponigis instruan metodon kaj ankaŭ rimedojn al ni. Kia bona metodo! Ni sukcesis kontribui multe al la komunuma sciado. Sed ĉu tiu sciado restos? Jes ja! Ekster la instrua sesio, homoj daŭre uzis Lukaponon, faris demandojn kaj kapablis komuniki silente. Laŭ mi tio moĵosis.

Por granda distraĵo, ni dividis la grupon. Unu grupo spektis. Alia grupo agis. Dum la agado, ili legis dokumenton, parolis kiel la personoj de tiu dokumento kaj gestis kiel ili. La titolo de tiu beletraĵo estas *mijomi telo* (Samseksamo ĉe la Maro) pri geĵaj piratoj. Ĉar ĝi estis amuze stranga, ni multe ridis pro la enhavo de la teatraĵo.

En alia distraĵo, la grupo kantis kiel unu voĉo. Tepo elektis la kanton Filozofio de la grupo Kajto kaj tradukis ĝin. Li lernis ĝin dum pasinta Esperanta renkontiĝo, kiam oni piediris en la naturo. Amanda Schmidt, nuna direktoro de la centra oficejo de Esperanto-USA, transdonis tiun kanton al li. Mi konservis la kantadon en mia aparato. Ho, sed la varmo lacigis nin ĉiujn, do alia gravaĵo ne okazis.

## Eventa fino

Fine la grupo malgrandiĝis. Multaj homoj foriris. Sed aliaj homoj restis kaj estis sufiĉe granda kvanto. Ni serĉis la ujon, kiun oni nomas *poki Tona* [Döner]. Ĝi estas panpoŝo kaj enhavas viandon, legomojn kaj spican saŭcon kaj estas de ĉi tie. Ni sukcesis vidi du ĉarmajn vendejojn, ekspoziciejon de strangaĵoj kaj grandan konstruaĵon pri spiona agentejo. Kiam Germanujo estis du, estis okcidenta Germanujo kaj orienta Germanujo. En la orienta, kiam la registaro deziris forte regi siajn homojn, ĝi observis ilin kvazaŭ per la okuloj. Laŭ la pensoj de la fia agentejo, malbonuloj ja povas esti ĉie. Do ni lernis ĝian historion, ĝian spionan teĥnologion, ĝiajn sekretojn kaj sekretajn manierojn. Tio estis la lasta afero por mi persone. Kiam mi revenis de la kongresejo, mi sentis min ema al nova kunveno. Mi deziras esti en la komunumo ankaŭ en alia okazo!

---

## Kie lerni Tokiponon en Esperanto?

- Tokipono: la lingvo de bono (libro)
- lipu sona pona (kurso)
- lipu Linku (vortaro)

*mi toki sewi tawa lawa pi lipu tenpo tan pali pona*—la redakcio gratulas la teamon de la tokipona revuo *lipu tenpo* pro ilia elstara laboro. Krome, ni dankas la aŭtoron, Ret SAMYS, kaj la adaptinton, Sonja LANG, pro la oportuno dividi kun esperantistoj verkon el tiu revuo. Temas pri legindaĵo por ĉiuj, kiuj interesiĝas, eĉ nur ete, pri Tokipono.

Ĉi tiu artikolo estas publikigita laŭ la permesilo CC-BY-SA 4.0 en akordo kun la originalo, donita al *lipu tenpo* laŭ tiu sama permesilo.

---

## Mito

senintenca esperantaĵo • Alena ADLER



Jen Alfa Romeo MiTo, kies nomo devenas de Milano, kie ĝi estis dezajnita, kaj de Torino, kie ĝi estis fabrikita de 2008 ĝis 2018 — kaj kie la Universala Kongreso okazis en 2023! La nomo estis elektita ankaŭ pro tio, ke *mito* estas itala vorto signifanta ... ‘mito’! La redakcio elektis ĉi tiun por komplementi la mikronovelojn ĉi-numere.

# Mikronoveloj

Por tiu ĉi rubriko ni petas rakontojn de precize 100 vortoj. Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero! Redaktis la mikronovelojn Hoss FIROOZNIĀ kaj Rafa NOGUERAS kunlabore kun la redakcio.

## Pariso, kun bedaŭro

Debra HAMEL

Ŝi estis la plej bela virino, kiun li iam ajn vidis — palvizaĝa, brilokula, flirtema ... kaj volonta, li opiniis. Li forportus ŝin al sia naskiĝlando, sed ŝia edzo estis grava reĝo, kies soldatoj abundis. Pli saĝe estis retiriĝi sen virino.



Tio okazis antaŭ multaj jaroj, trans larĝa maro. Nuntempe, multo estas dankinda: Liaj gepatroj maljuniĝas digne. Liaj filoj kaj nevoj plenkreskas sekure. La muroj de la urbo staras nepenetreble.

Tamen foje li tiel forte brulas pro sopiro al ŝi, ke li volonte vidus la murojn rompitaĵoj kaj sian urbon forbrulinta se nur unu fojon li povus tuŝi ŝin, Helenan el Sparto.

## Malĝusta puno

Timothy BORONCZYK

Zeŭso koleriĝas, do *mi* devas suferi? Evidente, deziri vivon liberan kaj senzorgan estas puninda afero. Nun mi estas kondamnita al senĉesa suprenirado kaj mal-suprenirado de ĉi tiu abomena monto.



Ĉu vere gravas, ke Tanato estis katenita? Li certe liberiĝis. Kaj Tezeon oni memoros kiel heroan mondvojaĝanton. Ne, mi tute ne kompatas ilin. Pli bone estus, se Zeŭso zorgus pri siaj propraj aferoj, anstataŭ ol enmiksi sin en la aferojn de aliaj.

Ĉiu tago plenplenas de senfrukta strebado, kaj mi tutkorpe laciĝas kaj kontuziĝas. Mi estas ŝtonego! Mi devus esti ripozanta sub la plaĉvarma suno — ne suferanta pro tiu fiulo, Sizio!

## La destino

Timothy BORONCZYK

Mi venas de estonteco ne tro fora. Ne, mi ne informos vin pri gajnigaj loteriaj numeroj, nek pri aĉetindaj akcioj. Mi jam prizorgis tion.




Ni faris gravajn progresojn en la scienco (ekzemple tempovojaĝadon!), kaj en la medicino, specife rilate al nia kompreno de la homa cerbo kaj la koncepto de libera volo. Sed finfine, multaj aferoj restas senŝanĝaj. Bedaŭrinde, klimata ŝanĝiĝo ankoraŭ minacas la mondon, kaj daŭras malriĉeco, milito, kaj malsano.

La plej grava diferenco inter via tempo kaj la mia estas, ke en mia tempo... vi amas min. Kaj kara, mi simple ne povas lasi tiun detalon al hazardo.

## La kutimuloj

Debra HAMEL

Sidante ĉe mia plej ŝatata tablo, mi varmigas la manojn per taso da teo kaj gvatas la aliajn klientojn. Rimarkeblas etaj ŝanĝoj. La juna viro, kies granda liphararo etendiĝis malsupren laŭ la vangoj kiam mi laste vidis lin, hodiaŭ fiksrigardas ekranon glatrazite. La du mezaĝuloj, kiuj ofte renkontiĝas ĉi tie por ludi ŝakon, hodiaŭ studas Skrablo-tabulon. Kaj la maljunulo, kiu iam sciigis al mi, ke lia edzino suferas de demenco, hodiaŭ rigardas min sen rekono. La vivo de la kutimuloj tiel disvolviĝas per malgrandaj paŝoj. Same iras la mia. Tetason post tetaso mi sidas kaj maljuniĝas, rimarkante sed ne rimarkite.



# Kolofono

*Usona Esperantisto* estas la oficiala bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu proksimume 200–1600 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte kun viaj nomo, adreso kaj memfoto. Kun aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevatajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas vidpunktojn de la redakcio aŭ de Esperanto-USA.

Sendu kontribuojn al [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org).

Materialoj aperintaj en *Usona Esperantisto* estas libere haveblaj kaj redisdoneblaj laŭ la permesilo CC BY-SA 4.0. Ni tamen petas, ke legantoj atendu du monatojn antaŭ ol reeldoni la plej freŝajn artikolojn.

La limdato por artikoloj en N<sup>o</sup> 2024:4 estas la **15-a de Decembro**. Sendante materialon al la redakcio, oni donas al Esperanto-USA neekskluzivan permeson redakti kaj aperigi la materialon en la bulteno kaj en aliaj eldonaĵoj. Aŭtoroj tamen retenas kopirajton kaj tial rajtas reuzi, reeldoni, aŭ vendi siajn originalajn, neredaktitajn verkojn laŭplaĉe, sen bezono atribui ilin al *Usona Esperantisto*.

**Redakcia teamo:** Alena ADLER kaj Logan HALL.

## Aŭtoroj (ordigitaj laŭ apero)

### Alena ADLER

Alena konsistigas duonon de la redakcio de *Usona Esperantisto*. Ri estas kaj tradukisto kaj tujelsendisto en Esperanto kaj la angla, interalie pri muziko kaj videoludoj.


<[alena.adler@esperanto-usa.org](mailto:alena.adler@esperanto-usa.org)>



### Timothy BORONCZYK

Timoteo esperantistiĝis en 2011. Li estas estro de la Esperanto-Societo de Sirakuso (Nov-Jorkio), kaj profesie laboras kiel programisto.

<[tboronczyk@gmail.com](mailto:tboronczyk@gmail.com)>



### Lee MILLER <[licxjo@gmail.com](mailto:licxjo@gmail.com)>


Liĉjo is a member of the Akademio de Esperanto, is an expert Esperanto instructor, and has been the main administrator of the Duolingo Esperanto Learners Facebook group since its inception in 2015. This article is adapted from one of his popular language lessons posted in that group.



### Logan HALL

Lojo konsistigas duonon de la redakcio de *Usona Esperantisto* ekde 2024. De 2020 ri estas administranto de la plej granda esperanta komunumo ĉe *Discord*. Profesie ri laboras kiel analizisto pri cibermalicioj.


<[logan.hall@esperanto-usa.org](mailto:logan.hall@esperanto-usa.org)>



### Brandon SOWERS

Brandon Sowers estas la prezidanto de la estraro de Esperanto-USA. Li esperantistiĝis en 2003 kaj aktivis en pluraj urboj kaj landoj. Li estas parto de la teamo de *Usono Persone*.

<[brandon.sowers@esperanto-usa.org](mailto:brandon.sowers@esperanto-usa.org)>



### Joshua HOLZER

Joshua estas vicprofesoro ĉe Westminster College (en Fultono, Misurio) kie li instruas politikan sciencon.

<[josh.holzer@westminster-mo.edu](mailto:josh.holzer@westminster-mo.edu)>



### Ret SAMYS

Ret SAMYS (*jan Ke Tami*) estas organizanto por tokiponaj kunvenoj en Eŭropo. Li estas verkisto kaj artisto de bildstrioj.

<[janketami.wordpress.com/lipu-pini-mi/](http://janketami.wordpress.com/lipu-pini-mi/)>

<[kijetesantakalu-o.tumblr.com/](http://kijetesantakalu-o.tumblr.com/)>

### Sonja LANG

Sonja LANG (*jan Sonja*) estas la kreintino de la populara planlingvo Tokipono. Ŝi verkas kaj eldonas librojn pri ĝi. Ŝi estas memlerninta poligloto kaj lernis Esperanton ĉirkaŭ 1995.

<[tokipona.org](http://tokipona.org)>

### Debra HAMEL

Debra estas verkisto de pluraj libroj pri antikva Grekujo (en la angla). Ŝi loĝas en Konektikuto, Usono.



Renovigu vian membrecon por 2025!

